REGO

 RUSIA ESPERANTO-GAZETO 

movada revuo en kunlaboro kun REU — *№ 2 (39) aprilo 2007*



en la numero

statistiko kaj impresoj pri REK kaj EoLA
rekordaj aliĝoj al RET-07
el la vivo de uralaj esperantistoj
festivaloj en Peterburgo, Uljanovsk, Ivanovo
15-jariĝo de la eldonejo "Impeto"
verku rakontojn por la libro "El ombro"
versaĵoj de Klara Ilutoviĉ kaj Viktor Ĉaldajev
"Bulteno de REU", novaĵoj, anekdoto kaj multo alia

Moskvo, 2007

enhavo:

01 Statistiko de REK-EoLA
01 Kiel ĉio pasis
03 Impresoj pri la partopreno
05 4-a Lingva Festivalo en Uljanovsk
06 RET-07 – rekordaj aliĝoj
07 50 jaroj en E-movado
08 La gepatra lingvo kaj Esperanto
10 Niaj festoj ne finiĝas
11 Moskvanoj en la Festivalo “Uvleĉenija”
13 Peterburga LF
14 Jubileo de Volgograda “Espero”
16 Al la oficialigo de Esperanto en Rusio
17 Protokolo de la 23-a Konferenco de REU
24 Decidoj de la 23-a Konferenco de REU
24 Funkcioj en la nova Estraro
25 Finaca raporto de REU-Estraro por 2006
26 Informo de ĈALK
26 Kvin komitatanoj B rekte elektitaj
27 Nova grupo tra membreco en REU
27 Unuafoje Ĉefdelegito en Nepalo
27 Pli da membroj en REU
28 Pli ol 6000 individuaj membroj en UEA
29 Novaj membrokartoj
29 Novaj REU-membroj por 2007
30 Dankon al Valeria Cvetkova!
31 Forpasis V.P.Grigorjev
32 Agado por UK en Rusio
33 BEF-4 ne okazos
33 La nombro de UK-aliĝintoj superis 1500
33 Printempa renkontiĝo en Vjetnamio
34 Esperanto en Pedagogia Universitato
34 Oratora konkurso en Jokohamo
35 Konkurso pri jubilea simbolo por UEA
35 “Familia Esperanto” renaskiĝis kolora
36 La plej maljuna esperantisto en Romo
36 Amikumu!
37 Movada foiro kaj kleriga tago en UK
37 La plej aĝaj esperantistoj de Samara
38 “Impeto”: retrorigardo en la jubilea jaro
39 Festo 2007
39 Kinoesperanto festivalo en Italio
41 Verku rakontojn por “El ombro”
42 Versaĵoj de Klara Ilutoviĉ
43 Versaĵoj de Viktor Ĉaldajev
09, 40 Anekdotoj
k3 Aĉetu la “Noktan patrolon”
k4 ERA-4 en Ĉeboksari
k4 Libroj de “Impeto”



la zorgoj pri organizado de REK kaj EoLA povas konsterni eĉ Mikaelon Bronŝtejn

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 2 (39) aprilo 2007

aperadas ekde 2000

redaktas Garik Kokolija
kunredaktas Viktor Aroloviĉ
kunlaboras Maksim Griŝin

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2007:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 200 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 20 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** ĉe UEA

STATISTIKO DE REK-EoLA

REK-25 EoLA-19

66 partoprenintoj el 20 urboj: Tiĥvin (16); Moskvo (14); Tjumenj (6); Niĵnij Novgorod (5); Jekaterinburg, Sankt-Peterburg (po 4); Severodvinsk (3); Ivanovo, Odincovo (po 2); Ĉeljabinsk, Dimitrovgrad, Iĵevsk, Jelec, Mitisĉi, Obolensk, Protvino, Rostov-Don, Ŝumerlja, Uljanovsk, Volgograd (ĉiuj po 1).

Viroj – 27 (41%), virinoj – 39 (59%).

La plej maljuna – Bronislav Ĉupin (1933), la plej juna – Jekaterina Galiĉskaja (2003). Averaĝa aĝo – 34 jaroj.

Plej spertaj laŭ jaro de esperantiĝo: Valeria Cvetkova (Sankt-Peterburg) – 1956, Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin) – 1962, Irina Gonĉarova (Odincovo) – 1966, Nadeĵda Zdrogova (Tihvin) – 1969, Valentin Seguru (Mitiŝĉi) – 1973.

Averaĝa jaro de esperantiĝo – 1993.

KIEL ĈIO PASIS

De la 6-a ĝis la 10-a de marto en Tiĥvin pasis la tradiciaj aranĝoj Rusia Esperantista Kongreso (REK-25) kaj Festivalo "Esperanto-Lingvo Arta" (EoLA-19), kiuj ĉi-jare okazis ne nur samloke, sed eĉ samtempe.

Al la aranĝoj venis 66 personoj. Kompreneble multis tiĥvinanoj kaj ne malmultis moskvanoj, sed konsiderante la distancojn, eĉ pli impresas amasa alveno de uralanoj. Krome, estis kelkaj partoprenantoj el Volgio (eĉ el Volgograd), el Rostov-Don, Jelec, kiuj same povas esti nomitaj longdistancaj gastoj. Peterburganoj ne multis.

En la unua vespero okazis, kiel kutime, interkona programo, kiun la gvidinta ĝin Mikaelo Bronŝtejn sukcesis fari siaspeca KGS – kun multaj amuzaj taskoj kaj premioj por preskaŭ ĉiuj.

La 8-an de marto oni, samkiel la tuta lando, kun granda plezuro festis la Internacian Virinan Tagon, tamen en la unua duono de la tago oni sukcesis ankoraŭ okazigi voĉdonojn en la Konferenco de REU. Dum la elektoj oni preferis subteni ĉiujn, kiuj kandidatiĝis: Andrej Grigorjevskij ankoraŭfoje prezidos, Nikolaj Gudskov restas vicprezidanto (sed jam sola), krome en la


la konkurso pri banan-manĝado dum la Interkona vespero

Estraron eniris: Konstantin Ĥlizov (Irkutsk), Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburg), Jurij Karcev (Uljanovsk), Valentin Seguru (Moskvo), Irina Gonĉarova (Odincovo), Vladimir Bespalov (Soĉi). Preskaŭ okazis skandalo, kiam sekvatage dum la Konferenco estis proponita decido, ke REU konsideru la junularan sekcion REJM nefunkcianta kaj tial mem funkciigu "sen-REJM-an" junularan sekcion. Pro la sendorma nokto la personoj, kiuj povus tion kontraŭstari, forestis kaj ie dormis. Feliĉe la decido ne realiĝis, sed ne realiĝis ankaŭ la propono pri amendo en la Ĝenerala Regularo de REU, priskribanta la sendependan karakteron de REJM – surbaze de la aktuala interkonsento inter REJM kaj REU.

Kadre de la arta programo kiel kutime plejparte estis kantoj kaj teatraĵoj, kiujn ĉefe prezentis respektive tiĥvinanoj kaj uralanoj.

En la kleriga parto debutis "video-prelegado": forestanta Aleksandr Blinov prelegis al la interesiĝantoj pri la organizado de Lingvaj Festivaloj. La prelego estis varme akceptita, same kiel la projekto preparadi videojn kun tiaj "virtualaj prelegantoj" por la klubaj kunvenoj kaj regionaj renkontiĝoj. Kredeble, ili taŭgus ankaŭ por memklerigado.



la publiko dum unu el la koncertoj

Dum la librofoiro (abunda kaj bunta) specialan popularecon havis libroj kaj diskoj de Mikaelo Bronŝtejn (kiujn li volonte kaj tuj subskribis por la aĉetintoj). Krome oni tre aktive aĉetis insignojn (kiel ĉiam) kaj la novajn REU-varbilojn. Konsiderante antaŭajn klubajn mendojn, iuj titoloj jam proksimas al elĉerpiĝo.

Pluraj homoj profitis la personan renkontiĝon kun la kasisto de REU Mikaelo Ĉertilov por pagi la kotizojn – sekve de kio jam nun, komence de marto REU-membraro por 2007 superis la finan nombron por 2006 (kiu mem estis rekorda).

La 9-an de marto posttagmeze en Tiĥvin okazis Lingva Festivaleto – cetere, jam la dua en la historio de la loka E-klubo. Partoprenis pli ol 50 personoj. La aranĝo estis absolute sukcesa, kaj ĉiuj prezentoj, kiujn mi mem vidis, estis altnivelaj kaj atentokaptaj. Entute estis prezentitaj 8 lingvoj: la angla, la franca, la ukraina, la komia, la kartvela, la hispana, la finna, Esperanto. Aparte min impresis la prezento de Mikaelo Bronŝtejn pri la ukraina, plaĉis la informriĉeco de la prezento

de la komia lingvo far Anatolij Sidorov (kiu i.a. klarigis helpe de la komia lingvo la sencon de la nomo de la rusia ĉefurbo), admirigis Oljga Gubina, moskvanino, rakontanta pri la hispana. Ŝi vigle prezentis ne nur la lingvon, sed ankaŭ dancojn kaj eĉ – kantadon, plenumitan de vera hispano! La hispanan amikon (e-iston) ŝi vokis per poŝtelefono kaj tiu el Katalunio kantis mallongan kanton. Li ja sciis, pri kiu aranĝo temas: pasintjare li partoprenis en LF en Ĉeboksari.



Aleksej Kozlov el Niĵnij Novgorod akompanas al la kantanta filino Bela

Kronis REk-EoLA-n "Totala koncerto", kiun malgraŭ la nomo ĉefe devis plenigi tiĥvinanoj – ĉekape kun la heroa Mikaelo Broŝtejn. La tutan tagon li havis altegan temperaturon, sed ne povis al si permesi ie ekkuŝi. (Ankaŭ la alia ĉeforganizanto – Aleksandr Belov ne lasis sin cedi al temperaturo kaj prudento. Malsanis ankaŭ pluraj aliaj partoprenantoj.)

La sekvan REK estis proponite okazigi en Ĉeboksari (aŭ proksime de ĝi – en Mariujo).

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

IMPRESOJ PRI LA PARTOPRENO

Estas interese scii, ĉu multaj el ni povas fanfaroni, ke ili renkontis printempon iel neordinare? Ŝajnas, por multaj ĝi komenciĝis nerimarkeble inter rutinaj zorgoj kaj ĉirkaŭanta nin amaso da malpura urba neĝo. Sed mi kun certeco povas diri, ke inter ni ekzistas feliĉuloj, kiuj sendube memoros venon de ĉi printempo, ĉar ni nekutime renkontis ĝin dum nia vizito al REK-EoLA en Tiĥvin (Leningrada regiono). Ĉio komenciĝis la 3-an de marto, kiam nia



sinprezento de la urala grupo

urala teamo renkontiĝis en la trajno kaj kune ni veturis al Tiĥvin. Inter ni estis ses tjumenanoj (Paŝa, Tanja, Nastja, Marina, Ksjuŝa kaj Olja), kiuj elveturis pli frue el Tjumenj, post kelkaj horoj de la veturado al la kompanio aliĝis jam en Jekaterinburg Galja Terentjeva el Ĉeljabinsk kaj ni, kvar jekaterinburganoj (Raja, Nataŝa, Sveta kaj mi). Tre agrable estis, ke al la stacidomo venis por deziri al ni "bonan vojaĝon" nia samurbanino Katja Zamislova. Krome tre agrabla surprizo estis tio, ke nia vagono ne nur ekstere, sed ankaŭ interne estis tute verda – imagu la murojn, farbitajn je milda helverda koloro!

Dum la tuta vojo ni penis provludi nian spektaklon, speciale preparitan por tiu ĉi aranĝo. Krome ni kune pripensis la formon de la prezentado de nia urala E-teamo dum la unua vespero de EoLA. Nu, vi komprenas, ke ankaŭ dumvoje ni ne enuis. Kelkaj el ni (Paŝa kun Tanja, Nataŝa kun Sveta kaj mi kun Nastja) ne elvagoniĝis je la 4-a nokte en Tiĥvin, sed veturis ĝis Sankt-Peterburg, kie ni dum la tuta tago promenis en la humida kaj ne tre suna urbo. Sed mi esperas, ke malgraŭ tio ĉiuj ricevis nur bonegajn impresojn de ĉi tiu promenado. Mi mem tute ne bedaŭras, ke malsekigis la piedojn en flakoj de Peterburgo. Interalie, la vetero de Tiĥvin ne tre difirencas de la peterburga, tial ĉiamaj flakoj apud la bazejo, kie pasis REK-EoLA, jam mirigis nin malmulte.


sinprezento de la tiĥvina klubo

Kio koncernas la programon de EoLA, mi povas diri, ke ĝi estis sufiĉe diversa. Do, ekzemple, krom praktiko de la lingvo kaj spektado de elpaŝoj de la partoprenantoj, ni povis ekscii "abocon" de skotaj dancoj, ludi diversajn ludojn, aŭskulti kantojn kaj kanti mem.

Nu, almenaŭ mia tagordo estis tia. Dum REK-EoLA mi kaj Nastja loĝis kune kun Raja kaj Galja en la sama ĉambro. Tuj mi klarigos, kion tio signifis: mateno kutime komenciĝis de tio, ke ni kune trinkis teon (ofte kun kompanio de venintaj gastoj). Poste ĉiuj spertaj esperantistoj foriradis por partopreni la Konferencon. Kaj ni, gejunuloj, dum tiu tempo vizitis dancokurson aŭ ludis. Post la tagmanĝo kelkaj esperantistoj denove kolektiĝis en nia ĉambro por trinki teon. Tiel ĉarme! Eĉ kelkaj programeroj okazis en nia ĉambro: sinprezentoj de apartaj E-aktivuloj, kelkaj diverstemaj diskutoj ktp. Preskaŭ nokte, kiam finiĝis la vespera programo (plej ofte tio estis iu koncerto), jam granda kvanto da esperantistoj (ĉirkaŭ 20 personoj)

renkontiĝis en nia ĉambro por daŭrigo de koncerto. Kutime ni kantis kune kun M.Bronŝtejn, A.Osokin aŭ A.Ĥrustaljov.

Tiel "andante" niaj noktaj kunsidoj transiradis en la matenajn, kiam nur la plej persistaj esperantistoj ne dormis (aŭ simple ŝajnigis, ke ne dormis) kaj daŭre amuziĝis. Eĉ insistaj laŭtaj najbaraj frapoj de trans la muro ne ŝokis nin. En tia amika etoso ni povis nenion timi: nek sendormajn noktojn, nek malvarman kranakvon anstataŭ la varma, nek subitan forŝalton de hejtado tage, nek pluvneĝon surstrate. La semajno tre rapide traflugis, kaj dum ĝi mi neniam bedaŭris, ke venis al la aranĝo en Tiĥvin. Por mi la aranĝo estis eblo ne nur por plibonigi la lingvokonon, sed ankaŭ por renkontiĝi kun jam konataj homoj kaj konatiĝi kun novaj talentaj esperantistoj. Finfine mi simple povis ricevi tiom da pozitivaj emocioj, ke nun eĉ printempa spleno por mi estos ne tiom danĝera!

Arina Osipova (Jekaterinburg)

4-A LINGVA FESTIVALO EN ULJANOVSK

La 31-an de marto okazis la 4-a Lingva Festivalo en Uljanovsk. Ĝin kunorganizis fakultato de fremdaj lingvoj de Uljanovska pedagogia universitato kaj Uljanovska E-klubo. Estis prezentitaj ĉ. 20 lingvoj, inter kiuj la cigana, la litova, la mordva, bafusam, dari kaj aliaj, pli kutimaj – de la hispana ĝis la tatara. Honora gasto de la festivalo estis A.Blinov, iniciatinto de LF-movado en Rusio. Ĉeestis 300-400 personoj.

La temo de la festivalo estis "Rjadom drug" ("Apudas amiko"), kio konvenas al nuntempaj streboj solvi interetnajn problemojn en la socio.

Post la malfermo la partoprenintoj povis viziti 4 prezentojn laŭ sia elekto. Funkciis ankaŭ ekspozicio de fremdlingvaj libroj, lingvaj konkursoj, renkontiĝoj kun vojaĝemuloj. Post la baza programo okazis 2-hora internacia koncerto.

Pri la festivalo raportis la ŝtata loka televidkompanio "GTRK Volga". Dum du tagoj oni povis vidi en la novaĵoj raportojn pri la festivalo: lunde mallongan informon, marde (sed nur en tagaj elsendoj) iom pli longan, kun intervjuoj de vizitantaj studentoj kaj A.Blinov. Ambaŭfoje dum kelkaj sekundoj sur la tuta ekrano videblis kovrilo de la libro "Jazik esperanto" de M.Isaev (filmita en la libroekspozicio; kutime oni multe pagas por tiaspecaj aperoj).

Specifaĵo de uljanovskaj lingvaj festivaloj estas ties orientiĝo al lernejanoj de lastaj klasoj kaj studentoj. Tio estas, ĉar ĝin eblas dume organizi nur tegmente de "tago de malfermitaj pordoj" en la fakultato. Tiel estis ricevitaj senpaga ejo kaj amaso da helpantoj-deĵorantoj de la fakultato. Kompense estis iom pli prezentitaj la studataj tie lingvoj – diverstipaj prezentoj paralele (ekz., la germana por komencantoj, la germana por progresantoj, berlina dialekto ktp.).

Ĉeforganizanto de la festivalo estis Margarita Jurjevna Karceva, kiu laboras en la fakultato.

Dum la prezentoj de E-o aperis dezirantoj lerni la lingvon. Estas planataj novaj kursoj, kiuj devas komenciĝi meze de aprilo.

Jurij Karcev (Uljanovsk)

RET-07 – REKORDAJ ALIĜOJ

Al RET-07, kiu okazos de la 18-a ĝis la 25 de aŭgusto (kun la paroliga periodo de la 15-a ĝis la 18-a) en Primorsko-Aĥtarsk ĉe Azova maro, jam aliĝis pli ol 200 personoj el 11 landoj (Belorusio, Britio, Francio, Germanio, Hungario, Israelo, Norvegio, Pollando, Rusio, Ukrainio, Usono). Inter la aliĝintoj estas multaj konataj E-aktivuloj (Vladimir Bespalov, Aleksandr Blinov, Mikaelo Bronŝtejn, Oleg Ĉajka, Valeria Cvetkova, Nina Cvileneva, Pol Denis, Andrej Grigorjevskij, Nikolao Gudskov, Vjaĉeslav Ivanov, Raja Kudrjavceva, Johann Pachter, Svetlana Smetanina, Gennadij Ŝilo, Jefim Zajdman k.a.) kaj E-artistoj (Mikaelo Bronŝtejn, Oleg Ĉajka, Nina Djomuŝkina, Georgo Handzlik, JoMo, Pavel Korotenko, Paŭlo Moĵajev, Mikaelo Povorin k.a.). Ĉio ĉi garantias, ke la aranĝo estos ne nur rekorda por lastaj jaroj laŭ la kvanto de partoprenantoj, sed ankaŭ elstare riĉa laŭ programo kaj arta nivelo.

Komence de aprilo jam estis certigitaj definitivaj kostoj por loĝado kaj manĝado dum RET, ili devos ne plu ŝanĝiĝi. La dua Informletero kun tiuj prezoj kaj skiza programo estos dissendita al la aliĝintoj en junio, sed jam nun la prezojn eblas ekscii en la ttt-ejo <www.stelaro.ru> kaj ĉi-sube.

Loĝado en ligna dometo (prezo de unu loko por unu tagnokto): malpli ol 5-jaraĝaj – senpage (sen aparta lito); infanoj malpli ol 16-jaraĝaj kaj studentoj (kiuj kunhavu studentan bileton kaj konfirmilon de dekanejo pri la studado) – 120 rub.; plenkreskuloj – 180 rub.

Loĝado en komforta ĉambro (prezo de unu loko por unu tagnokto): malpli ol 5-jaraĝaj – senpage (sen aparta lito); infanoj malpli ol 16-jaraĝaj kaj studentoj (kiuj kunhavu studentan bileton kaj konfirmilon de la dekanejo pri la studado) – 250 rub.; plenkreskuloj – 350 rub. (en 4-lita ĉambro), 400 rub. (en 3-lita ĉambro), 450 rub. (en 2-lita ĉambro).

Loĝado en propra tendo por ĉiuj krom la infanoj malpli ol 5-jaraĝaj – 30 rub. tage por unu persono (inkluzivas uzadon de duŝejoj, necesejoj k.s.).

Loĝado en amasejo (en lignaj dometoj surplanke en propra dormosako) por ĉiuj krom la infanoj malpli ol 5-jaraĝaj – 70 rub. tage por unu persono (inkluzivas uzadon de fridujo kaj televidilo en la dometo, eventuale estos ankaŭ fornoj por la memzorgaj manĝantoj).

Manĝado: trifoja manĝo kostos 260 rub. por unu tago; aparta matenmanĝo kostos 70 rub., tagmanĝo – 120 rub., vespermanĝo – 100 rub.

Ĝis la fino de junio ankoraŭ validos la tria aliĝperiodo, kiam la aliĝkotizo estas 400 rub. (ĉiuj rabatoj por gejunuloj, familioj, grupaj aliĝoj kaj programkontribuoj estos konsider-



ataj surloke), ekde la 1-a de julio la aliĝkotizo fariĝos 500 rub. (ankaŭ kaze de la surloka aliĝo). RET-07 estas destinita unuavice por E-parolantoj; por la neparolantoj, kiuj ne trapasos paroligan periodon, estas antaŭvidita signifa krompago.

La plenan liston de aliĝintoj, kostojn, programplanojn, aliĝilon kaj aliajn aktualajn informojn pri RET-07 eblas vidi ĉe <www.stelaro.ru>.

Garik Kokolija (Moskvo)

50 JAROJ EN E-MOVADO

E-movado, mortinta en nia lando ankoraŭ antaŭ la 2-a mondmilito, renaskiĝis en Leningrado meze de la 50-aj jaroj de la 20-a jarcento.

Grupo de sciencistoj-esperantistoj laŭ la iniciato de la fama sciencisto Sergej Obruĉev kaj sub lia gvido organizis en la Domo de Sciencistoj nome de M.Gorjkij E-sekcion. La ĉiutagan laboron efektivigis tiam docento Boris Toll. (Tie en 1959 estis pompe festita 100-jara jubileo de la Majstro Zamenhof.) Tamen la sekcion partoprenis nur esperantistoj, lernintaj la lingvon ankoraŭ en la 20-aj – 30-aj jaroj. Necesis havigi novajn, junajn fortojn.

En 1957 en Moskvo estis okazonta Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj, kaj tio donis puŝon al ĉiuloka renaskiĝo de Esperanto-movado. En Moskvo aperis junulara grupo “Fajrero”, en Leningrado – “Aŭroro”.

Aŭtune de 1956 en la urba junulara tagĵurnalo “Smena” aperis artikolo pri Esperanto kun alvoko studi la lingvon en la Kulturdomo de industria kooperado (nuna Palaco je nomo de Lensovet). Amaso da gejunuloj venis post tralego de la artikolo. Mi estis inter ili. Post pli detala prelego pri la lingvo estis organizitaj kelkaj grupoj por studado de E-o, kiujn gvidis Fjodor Kolobanov, Barbara Cvetkova, Aleksandra Sljadneva kaj aliaj. Krom lernado de la lingvo, ni preparis temojn por la urbaj ekskursoj, ofte kune pasigis liberan tempon, kaj finfine amikiĝis kaj fondis junularan grupon “Aŭroro”, kiun gvidis universitata aspirantino Galina Gorelova.

Venis tempoj, kiam nian urbon komencis viziti eksterlandaj esperantistoj. Jen kiam fariĝis utilaj niaj urbaj ekskursoj! Ni volonte akompanis gastojn tra la urbo kaj poste korespondis kun ili aŭ kun aliaj personoj, kies adresoj abundis en E-revuoj, kiujn iom post iom ni komencis ricevi kaj aboni.

Mi povas diri, ke nia junulara grupo tre pace kunlaboris kun “aĝuloj”. Ni kune vagis de unu kulturdomo al la alia (tia sorto!), ni kune preparis klubajn programojn (buŝalmanakojn, murgazetojn), koncertojn, kolektis kluban bibliotekon (kiu kelkfoje dum somera tempo ien malaperadis), tradukis materialojn por E-eldonaĵoj.

Aktivuloj de la movado volonte partoprenis Baltajn E-Tendarojn (ekde 1961) kaj aliajn E-aranĝojn en diversaj lokoj de nia vasta lando. En 1963 la unuan fojon post la 2-a mondmilito sovetiaj esperantistoj partoprenis UK-on, kiu okazis en Bulgario. Inter la partoprenintoj estis ankaŭ aŭroranoj (L.Belova, V.Nazarov, J.Konstantinov kaj aliaj). Tie J.Konstantinov, tiama prezidanto de “Aŭroro”, konatiĝis kun la fama nun H.Tonkin (tiam aktivulo de TEJO). Kaj poste ni volonte akceptis lin en Leningrado. Kiam la aŭroranoj fariĝis pli aĝaj, ni unuiĝis kun E-klubo (restis nur junulara sekcio sub gvido de V.Cvetkova).

Samtempe kun funkciado de E-klubo en la domo de Paco kaj Amikeco estis

fondita la sekcio de MEM (Mondpaca Esperantista Movado) sub gvido de la fama leningrada esperantisto, iama membro de SEU-Estraro S.N.Podkaminer. Pli poste, en la jaro 1979 tie ekfunkciis ASE-filio de nia urbo. Krom ligoj kun eksterlandaj esperantistoj tie estis daŭrigata ankaŭ laboro por la enlandaj bezonoj (ekz. oni tradukis artikolojn por E-revuoj, verkojn de partiaj gvidantoj kaj direktivojn de KPSU).

Post perestrojko kondiĉoj por la laboro ŝanĝiĝis. La pordoj de kulturdomoj fermiĝis por ni (pro altaj luprezoj). Tiam la movadon savis nova generacio. Kun granda obstino kaj fakte per memperlaborita dum 10 jaroj mono Anna Butkeviĉ batalis por "tegmento" al nia "Espero". "La sepa ĉielo" – tiel ni nomis nian klubejon – estas ĝis nun memorinda por multaj. Sed ŝtatdirekto de "ĉiovendado" kaŭzis forpelon de nia klubo el tiu benita loko.

Tamen malgraŭ ĉio la E-laboro estas daŭrigata... Centoj da leningradanoj dum tiuj jaroj studis E-on, ne ĉiuj el ili fariĝis esperantistoj, sed certe restis amikoj de E-o. Kaj ĝis nun restis personoj, kiuj naskiĝis kiel esperantistoj antaŭ 50 jaroj kaj enmovadas ĝis nun: N.Kublanova, V.Ovĉinnikov, V.Nazarov, J.Konstantinov, L.Belova. Ĝis nun instruas E-on Maria Abolskaja kaj Valeria Cvetkova. Estas iom strange, ke nun ni estas veteranoj de E-movado! Ni aktivas, por ke E-movado en Leningrado/Sankt-Peterburgo ne estingiĝu!

Lidija Belova (Sankt-Peterburg)
kun kontribuoj de M.Abolskaja kaj V.Cvetkova

LA GEPATRA LINGVO KAJ ESPERANTO: NEDISIGEBLAJ LINGVAJ RAJTOJ DE ĈIU HOMO

"La gepatra lingvo estas kara al ĉiu el ni. En la gepatra lingvo ni eldiras niajn unuajn vortojn kaj esprimas niajn pensojn plej bone. Ĝi estas la bazo, sur kiu ĉiuj homoj disvolvas sian personecon de la momento, kiam ili spiras sian unuan spiron, kaj ĝi estas tio, kio subtenas ilin dum iliaj vivoj. Ĝi estas la rimedo por lerni respekton al si mem, al sia historio kaj al sia kulturo kaj, ĉefe, al aliaj homoj kaj al iliaj diferencoj."

Per ĉi tiuj vortoj la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Koïchiro Matsuura, malfermas la ĉi-jaran mesaĝon por la Tago de Gepatra Lingvo, kiu estis celebrata ĉiujare la 21-an de februaro. Ĉiu parolanto de la internacia, neŭtrala lingvo Esperanto certe aprobas ilin, ĉar la parolantoj de Esperanto scias pri lingvaj rajtoj, kaj ilia agado celas protekti tiujn rajtojn ĉie en la mondo rilate al ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj. Neniu lingvo, fakte, estas tro malgranda, por ke oni malatentu kaj mistraktu ĝiajn malmultajn parolantojn. Ankaŭ ili estas homoj samvaloraj kiel ni, kaj ankaŭ ili rajtas je respekto. Ilia kulturo ne estas portanto de valoroj malsuperaj al tiuj de aliaj kulturoj, kiuj posedas la rimedojn por altrudi sin al ĉiuj.

Al la parolantoj de Esperanto apartenas ankaŭ la konceptoj, kiujn oni trovas en la deklaro, rilate al la graveco en la nuna mondo de harmonia kombinado inter diverseco kaj identeco, kio en nia kampo signifas kombinadon inter gepatra lingvo kaj aliaj lingvoj bezonataj por komunikado kun aliaj komunumoj. Inter tiuj lingvoj Esperanto estas la lingvo por rilatoj internaciaj je regiona kaj monda nivelo. Espe-

Rabeno kaj pastro veturas en la rapidvojo, ĉiu per sia aŭto. Okazas akcidento: ambaŭ aŭtomobiloj karambolis kaj preskaŭ plene detruiĝis. Sed la du Di-servantoj saviĝis. Ili eliras, staras kune ĉe la vojrando kaj trovas ke nenio okazis al ili.

La rabeno rigardas la alian homon kaj diras: “Vi estas pastro, ĉu ne?” “Jes”, respondas la pastro. Rabeno: “Okazis al ni vera miraklo. Certe la Eternulo deziris ke ni renkontiĝu kaj fariĝu amikoj”. Pastro: “Povas esti”. Rabeno: “Mi opinias ke ni devas tosti pro nia saviĝo kaj je nia nova amikiĝo. Mi havas hazarde botelon da vino. Espereble ĝi ne estis frakasita. Ĉu vi pretas drinki kun mi?” Pastro: “Kial ne?” La rabeno alportas el la veturila kofro bonstatan vinbotelon kaj ofertas al la pastro. Tiu ĉi drinkas iomete, sed sekve de instigoj de la rabeno li poste pli kaj pli drinkas. Sed la rabeno tute ne drinkas. Pastro: “Kial vi ne drinkas ankaŭ?”. Rabeno: “Mi preferas unue atendi la policon.”

(juda anekdoto de Josef Shemer)

ranto ne celas anstataŭigi la naciajn kaj lokajn lingvojn. Tio estu klara al ĉiuj. La parolantoj de Esperanto celas protekti ĉies lingvon kaj ĉies identecon.

Eraras la defendantoj de lokaj lingvoj kontraŭ ŝtataj lingvoj. Ili vidas nur sian problemon, kaj persiste tute ignoras la danĝeron de pli grandaj lingvoj, kiujn ili eĉ bonvenigas. Kontraŭ tiuj ili certe ne povos rezisti en la posta generacio. Esperanto celas defendi ankaŭ iliajn rajtojn, kiel asertis Zamenhof, kiam li parolis pri la ebla utiligo de Esperanto en plurgentaj regnoj.

Eraras la defendantoj de naciaj grandaj kaj mezgrandaj lingvoj en Eŭropo kaj ĉie tra la mondo, kiuj vidas nur sian lingvon kaj sian kulturon kaj pensas, ke ili povas sukcesi savi sin mem, eĉ se ĉiuj aliaj pereos. Ili nur revas resti kiel la dua plej granda lingvo en la mondo. Alianco inter ili kaj la parolantoj de Esperanto estus avantaĝa por ĉiuj. Eraras la amaskomunikiloj, kiuj de tempo al tempo atentigas kontraŭ la ebla forigo de ĉiuj lingvoj fare de Esperanto. Ofte ne temas pri eraroj, ĉar tiaj akuzoj venas de homoj kaj komunikiloj el landoj, kie oni parolas lingvon deklaritan internacia, kaj kiuj grandskale respondecas pri la malapero de lingvoj kaj kulturoj en la mondo nun.

Ni rediru nun tute klare: Esperanto estas nur dua lingvo por kontaktoj inter gentoj de malsamaj lingvoj, ĉiu el kiuj rajtas kontribui al la monda kulturo siajn konojn kaj siajn pensojn. En monda skalo nia riĉeco estas nia varieco, sed sen lingvo, kiun ĉiu same povas lerni facile kaj laŭ libera elekto, sekvos nur malriĉeco kultura kaj unuformeco tutmonda.

Esperanto ne havas armeon, kiu disvastigas ĝin. Esperanto ne havas ekonomiajn interesojn, kiuj devigas homojn lerni ĝin. Esperanto ne havas kulturan industrion, kiu volas disvastigi siajn produktojn koste de lokaj alilingvaj produktoj. Esperanto nur havas la forton de racio kaj de justeco, pro kiu ĉiam pli multaj homoj libervole elektas ĝin por riĉigi sian internacian vivon, por koni aliajn kulturojn, por kontribui al pli justaj internaciaj rilatoj.

Renato Corsetti, la Prezidanto de UEA



du Aleksandroj – Osincev kaj Kalaŝnikov

NIAJ FESTOJ NE FINIĜAS

aŭ iom el la vivo de uralaj esperantistoj

Festante la malnovan Novan Jaron en la amika rondo en Jekaterinburg, mi esperis, ke ĝi nepre alportu al mi multajn E-vojaĝojn. Ja laŭdire, kiel oni renkontos Novan jaron, tiel oni ĝin travivos. Kaj al mia miro tio vere jam komencis efektiviĝi! Ĉiumonate mi ĝuas novan viziton al Esperantujo.

Jam januare en la vilaĝa domo de Aleksej Fomin apud la fabela neĝkovrita pinarbaro ni partoprenis en la varma renkontiĝo de ĉeljabinskanoj kun niaj malnovaj E-amikoj el Miass, riĉa je nostalgiaj rememoroj kaj kantoj.

Februare okazis mirinda kaj neforgesebla Tago de Geamantoj en Jekaterinburg, al kiu malgraŭ frostego kuraĝis veni multaj gastoj el Tjumenj kaj Ĉeljabinsk. Ho, vi ne povas eĉ imagi, kiom romantika ĝi estis! “Ampoŝto” kun abunde ricevitaj de ĉiuj kortuŝaj konfesoj kaj bondeziroj; prezento de la lirika teatraĵeto “La kvar kandeloj”; pasiaj ampoemoj, sonantaj trilingve; bele aranĝita Arbo de Amo; laŭronda respondo de ĉiu partoprenanto al la demando pri la signifo de amo en ties vivo; gajaj ludoj kaj konkursoj en “Insulo de Amo”; kaj aparte “Angulo de Kisoj”, kie al la fino de la renkontiĝo ne mankis vizitantoj...

La printempo surprize venis al ni jam komence de marto kun suno, flakoj kaj varmaj brakumoj de karaj geamikoj en REK-EoLA. Estas tre ĝojige, ke nia urala teamo, plejparte juna kaj plena de entuziasmo, sukcesis veni al Tiĥvin 11-ope kaj bone montris sin, aktive partoprenante en ĉiuj programeroj – en la Interkona Vespero kaj en la Konferenco de REU, en la festa 8-Marta Vespero kaj en la diskutrondo pri la kluba kaj regiona agado, en koncertoj, en dancokurso kaj kantlernado. Ĉiutage nia ĉambro plenis de



la renkontiĝo en Miass

teumantaj gastoj, kaj ĉiunokte en ĝi kunvenadis, babiladis, ludis kaj kantis ĝismatene tuta aro da diversurbaj kaj diversaĝaj geamikoj – la pordo estis malfermita por ĉiuj.

La 31-an de marto jam nova festo kunvenigis en Uralo 21 esperantistojn el Jekaterinburg, Tjumenj kaj Ĉeljabinsk – Tago de Humuro. Pli ĝuste, de E-humuro – ne nur ĉar la renkontiĝo, kiel ĉiuj aranĝoj en Jekaterinburg, pasis nepre en Esperanto. Sed ĉar en la programo estis "Humuro en Esperanto-literaturo" – rakontoj pri famaj verkistoj R.Schwartz, R.Rossetti k.a. kun prezento de iliaj E-humuraĵoj. Abundis anekdotoj kaj ŝercoj, artistemaj gejunuloj ludis gajajn skeĉojn. Dum teumado estis sonigitaj humuraj E-kantoj en plenumo de M.Bronŝtejn, A.Peĉonkin kaj A.Radajev. La festo pasis plej gaje kaj ĝojplene, laŭtaj ridoj sonis tra la tuta vespero.


festa tablo la 1-an de aprilo

Sed ne pensu, ke uralanoj nur distras sin senfine! Tutsimple ĉiuj seriozaj demandoj kutime estas diskutataj ekster la festaj kunvenoj kaj en la regiona dissendolisto. Jen, ankaŭ la 1-an de aprilo, kiam ĉiuj "normalaj" rusianoj ridis, ŝercis kaj trompis unu la alian, nia triurba teamo kondamnite sidis tutserioze kaj gravmiene ĉe la ovala "ronda tablo" kaj sulkigis la fruntojn, traktante jam en malpli vasta kaj gaja rondo la organizajn demandojn de la senevite alproksimiĝanta "EsPrimo-4"...

Tamen certe ni ne nur mornis kaj malĝojis tiutage! Post la fino de la organiza kunveno nia "ŝvita" laboro estis bele rekompencita per vera festeno kun multaj bongustaĵoj en gajega amika rondo! Dankon al Raja Kudrjavceva – la plej gastama mastrino kaj la plej fervora organizanto de E-agado en Uralo!

Sed la plej grava regiona renkontiĝo, nia tradicia printempa festo, atendas nin maje en Tjumenj, kaj ni faru ĉion, por ke nia Esperantista Primavero refoje kunigu uralanojn kaj siberianojn en grandan amikan rondon. Bonvolu vizitu nian ttt-ejon <http://www.ural-sib.org/eo> kaj vidi ĉiujn informojn pri "EsPrimo-4".

Niaj festoj – ne finiĝu!

Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)

MOSKVANOJ EN LA 9-A FESTIVALO "UVLEĈENIJA"

La 18-an de marto 2007 naŭ moskvanoj partoprenis en Ivanovo la Festivalon "Uvleĉenija" ("Ŝatokupoj"), iam (antaŭ 9 jaroj!) lanĉitan de lokaj esperantistoj. Tiam post prezento de Esperanto formiĝis la grupo de kursanoj, kiuj poste fondis la gloran ivanovan E-klubon "Teamo", gviditan de Andrej Grigorjevskij. Kelkajn jarojn "Teamo" kaj MASI aktive kunlaboris, faris kunajn projektojn, vizitadis unu

la alian ktp. – sed tio jam estas alia historio...

Nun la Festivalo estas grandioza, jam regiona aranĝo, populara ne malpli ol la Lingvaj Festivaloj en Ĉeboksari (kaj organizita laŭ la sama skemo). Do, venis pli ol mil homoj, okazis ĉio en la tre oportuna ejo de la Metilernejo pri Kulturo, kun ekipita scenejo, granda koncerta halo, oportunaj klasoj ktp. Ekde la 11-a horo dimanĉe eksvarmis tie la homoj, bunte vestitaj, junaj, gajaj – estis bonega festa etoso. La ĉefa celo de la Festivalo estas konatigi la junan publikon kun diversaj hobioj, metioj, sekcioj, interesaj aferoj ktp. Nu, certe, ankaŭ reklami sin. Ekzemple, esperantistoj dum la prezentado de Esperanto varbas ĉi tie homojn por la E-kursoj. Cetere, Esperanto estas la sola lingvo, prezentata en la festivala programo kiel hobio. Kaj ĝi revenis al la festivala programo post kiam moskvanoj reproponis ĝin antaŭ 3 jaroj.

Kelkfoje dum la pasintaj Festivaloj Esperanton prezentadis mi, sed ne ĉi-jare – ĉar pri tio okupiĝas Maŝa Ĵukolina, la gvidantino de E-kursoj en Ivanovo. Ĉi-foje ŝin tre aktive helpis niaj amikinoj Nataŝa Ĵuravljova kaj Lena Kormilicina. Dum la Malfermo ili bonege invitis la publikon al la prezentado, venis tre multaj homoj. Viktor Saveljeviĉ Poltirev – malnova ivanova esperantisto-veterano, kiun venigis Tatjana Georgijevna Loskutova, prelegis pri apero de Esperanto. La porjunulara programo, anticipe preparita de la knabinoj, estis realigita nur parte, tamen al la kurso aliĝis kelkaj personoj.

Dum la sama programparto nia Indiano (Dmitrij Kokorev) rakontis pri la "Krita maso" (la biciklista manifestado) kaj pri Ekovilaĝoj – kun projekciado de filmetoj kaj fotoj. Malgraŭ ke ĉeestis ĉefe moskvanoj (la temo estas tute nova por la lokanoj kaj por la Festivalo), okazis tre interesa parolo, inklina al vigla diskutado – iniciatita ĝuste de la skeptikaj "nepreparitaj" ivanovanoj. Miaopinie, necesas daŭrigi la temon ĝuste en la reĝimo de diskutado – ĉar ĝi tuŝas gravajn problemojn, pri kiuj ne kutimas pensi junaj urbanoj.

En la sekva programbloko mi kun Ardo (Pavel Marutenkov) prezentis petveturadon. Mi faras tion jam la trian jaron sinsekve. Kvankam ĉi-foje ni ne anoncis la temon dum la Malfermo, venis treege multaj homoj, lokoj en la klaso absolute ne sufiĉis. Vidinte tion, mi eksentis kiel kreskas en mi la bezonata entuziasmo – kaj la konversacio ekgalopis. La homoj ne volas disiri, kaptas min en koridoroj... Kaj miaj eksaj aŭskultantoj ekster la klaso rakontas al mi pri siaj petvetur-sukcesoj (ekz., ĝis Bajkalo!), petas pliajn konsilojn, invitas por la sekva jaro. Sed kio ne malgravas envere: fakte, mi prezentas ĉi tie Esperanton, sed en alia formo kaj por la publiko, kiu al Esperanto-prezentado veni ne intencis. Mi parolas pri la Pasporta servo, pri la kongresoj kaj renkontiĝoj, al kiuj mi petveturadas kaj kiuj, fakte, puŝis min al la ŝoseoj, pri denaskeco de mia filino, kiu petveturis kun mi en la aĝo 12 jaroj al la Infana Kongreseto en Hispanio ktp. La metodo absolute kongruas al nia nuna tendenco prezentadi Esperanton kaj esperantistojn en kunteksto de ekster-esperantista mondo. Do, ĉio rezultis bonege.

Samtempe Misa (Natalja Nikolajeva) dancigis la popolon en la centra vestiblo – dum la Malfermo ŝi anoncis festadon de la Tago de Sankta Patriko – garantiita sukceso, la sekva furoro de la moskva kontribuaĵo.

Nu, kaj speciala mencio pri la ĉefa moskva maniulo: en la malfermita vestibleto de la 3-a etaĝo ekde la 10.30 ĝis la 19.30, sen eĉ unu eta paŭzo, Vladimir Savinov trinkigis ĉiujn dezirantojn – ŝajne, la tutan milon de la festivalanoj – per la plej luksaj ĉinaj teoj. Frenezige! Tio estis la plej populara, la plej vizitata, la plej etosa kaj varma loko, ŝatata de ĉiuj jam dum tri Festivaloj.

Kio esence gravas por mi – la amikeco kun la ĉarmaj organizantinoj de la Festivalo – la direktoro de la Festivalo Nataŝa Golovina kaj la gvidantino de la Festivala programo, nia suno Katja Kotuĥina, tiu sama Katja, kiu pasintsomere “estis gvidanto de ĉio” en nia “Vsplesk-2”. La knabinoj estis evidente tre kontentaj pri niaj kontribuoj kaj, kiel ĉiam, malgraŭ terura okupiteco, dediĉis al ni multe da neformala atento (intercetere, ĉi-foje ili loĝigis nian 9-opon en la Domo de junaj turistoj centre de la urbo). Ni ricevis specialan diplomon por la moskva delegitaro “pro la aktiva partopreno, pozitivo kaj subteno” kaj aludojn pri iu surprizo por moskvanoj, kiu atendos nin en la sekva, jubilea Festivalo: “Nepre venu, kaj venu amase!” Ege gravas por ni, ke Katja pretas denove kontribui por la programo de “Vsplesk-3” – per freŝaj programeroj. Do, nia kunlaboro daŭras kaj prosperas. Tio vere entuziasmigas!

Kaj dum la rea vojo mi kaj Misa denove kaj denove revenadis al la temo de simila festivalo en Moskvo. Nu, kial ne?..

Irina Gonĉarova (Odincovo)

PETERBURGA LF

La 4-an de marto sukcese pasis la Peterburga lingva festivalo. La aranĝon partoprenis ĉ. cent personoj, inkluzive de aliurbaj gastoj el Jelec (1), Iĵevsk (1) kaj



Moskvo (pli ol dek).

La programo komenciĝis je la 11-a horo kaj finiĝis je la 17-a kun posta neformala teumado. Okazis 27 prezentoj, inter ili kvin – de lingvosciencaj branĉoj (kiel psikolingvistiko kaj fonologio), kiuj iĝis specialaĵo de la peterburga festivalo.

La plenan liston de okazintaj aranĝoj eblas legi ruse ĉe <http://www.e-novosti.info/blog/05.03.2007/1>. Kelkaj lingvoj (kiel la nogaja kaj la iĵora) estis prezentitaj probable la unuan fojon en la historio de rusiaj lingvaj festivaloj. La menciitaj du prezentoj ne nur estis unikaj, sed ankaŭ tre kvalitaj.

Bedaŭrinde ne venis ĵurnalistoj, malgraŭ la tiudirekta preparlaboro. Tamen jam vendrede – du tagojn antaŭ la evento – renoma peterburga gazeto "Delovoj Peterburg" publikigis artikoleton pri la festivalo, tamen ne menciinte la organizintojn kaj farinte preseraron en citaĵo.

Oficialaj organizintoj de la Peterburga LF estas REU kaj la jura fakultato de la Peterburga Agrikultura Universitato. Faktan surlokan preparadon faris membroj de la Sankt-Peterburga Interlingvistika Rondo (SPIRo): i. a. Andrejsons, Guseva, Ivanov, Kolodin kaj Koltunov.

Surbaze de analizo de la 71 plenigitaj enketiloj klaras, ke plejparto de la partoprenintoj multe ŝatis la eventon kaj deziras havi ĝin refoje – eble kun pli da ekzotikaj lingvoj kaj pli da ebloj por oportune manĝi dum la tagmanĝa paŭzo.

(esperanto-rus-informoj)

JUBILEO DE VOLGOGRADA "ESPERO"

En Volgograd nuntempe ekzistas tri Esperantaj kluboj: "Espero", "Venko" kaj



"Stelaro". La plej malnova el ili estas "Espero", kiu festis sian 30-jariĝon pasintnovembre.



Niaj jubileaj agoj havis du partojn. Komence ni publikigis anoncon en la loka gazeto "Novosti Sarepti' ("Novaĵoj de Sarepta"), faris elsendon en uzina radio pri Esperanto. En du urbaj bibliotekoj ni faris ekspozicion pri E-o kaj rakontis pri la movado en nia regiono.

Estis ankaŭ prezentado de la klubo en la muzeo "Staraja Sarepta" ("Malnova Sarepta"), kie nuntempe la klubo havas la ejon por kunvenoj. En la prezentado partoprenis estro de la muzeo kaj reprezentantoj de kelkaj naciaj asocioj, kiuj ankaŭ havas sidejojn en la muzeo: tataroj, germanoj, belorusoj, kozakoj k.a.

Dum unu el la klubkunvenoj ni decidis inviti kiel eble multajn eksklubanojn por la festa jubilea vespero. Pri tio okupiĝis mi, kiel la prezidanto de "Espero". Mi serĉis la telefonnumerojn, poste telefonis kaj kontaktis 26 samideanojn. Neniu el ili malkontentis pri la kontakto. Male, ĉiuj ĝojis, demandis pri nuntempa aktivado, rememoris pri tio, kio estis antaŭ 15-20 jaroj, rakontis pri sia vivo. Mi sentis, ke en la animoj ili konservis varmajn rememorojn pri sia Esperanta juneco.

La dua parto de nia jubileo estis festa vespero, kiu okazis la 25-an de novembro en salono de la muzeo. Partoprenis 25 personoj, inter kiuj estis 8 eksaj klubanoj. La salono estis bele ornamita, sur la muroj oni povis vidi multajn fotojn de diversaj periodoj. Sur kelkaj fotoj ni povis kun funebro vidi niajn karajn aktivulojn Saŝa, Nadja kaj Polina de la Miĥajlov-familio, kiuj estis murditaj antaŭ 4 jaroj.

Post la antaŭparolo de Valentina Spicina pri gravaj momentoj en historio de la klubo kelkajn vortojn pri la pasinteco diris Jelena Aleksandrova kaj Nadeĵda Ŝapĉeva. Ili rakontis pri tio, kiel bone la esperantistoj iam kunfestis Novjaron (62 personoj!), kiel kune laboris en dendroparko ktp. Nuntempaj junaj klubanoj kun intereso aŭskultis ilin.

Post malgranda koncerto de gejunuloj ni komencis ricevi muzikajn gratulojn. Komence kantis kaj gitarludis nia malnova amiko, prezidanto de turista klubo V.A.Doroŝin. Poste estis tre nekutima gratulo de germana ĥoro. Ili gratulis nin per kvar muzikverkoj, kiujn ili ludis en najbara kirko per ties orgeno.

Krom tio ni ricevis gratulan telegramon de nia eksklubano Andrej Grigorjevskij. Li finis en nia klubo elementan kurson sub gvido de ĝia fondinto Tatjana Vtorova. Poste li mem fondis alian urban klubon "Rado", iĝis bona organizanto de EoLA-1 kaj aliaj aranĝoj en Volgograd.

Laŭ programo de la festo, post la koncerto kaj ĉiuj gratuloj ni faris senmalgajnan loterion, kiu rezultiĝis tre gaja kaj sukcesa. Certe, estis ankaŭ tradicia teumado



kun dolĉaĵoj, dum kiu konstante oni aŭdis: "Rigardu, kia juna mi estis! Ĉu tiu estas vi? Kaj kie estas li nuntempe? Kiam tio estis?" ktp. Poste estis ludoj, kantoj kaj apartaj, privataj babiladoj.

Plej kontentaj partoprenantoj de la festo estis la eksaj klubanoj. Ili kore dankis pro la invito. Tri virinoj eĉ petis organizi por ili specialan rapidkurson por rememori la lingvon, ĉar ili volas denove reveni al aktiva E-movado. Ankaŭ ni, la organizantoj, konstatis, ke ĉiuj jubileaj aferoj estis sukcesaj. Ni bedaŭris nur pri tio, ke ne alvenis Tatjana Vtorova, kaj ke en nia festo partoprenis malmultaj geamikoj el la klubo "Venko", kun kiu ni havas bonajn interrilatojn kaj oftajn amikajn kontaktojn.

Valentina Spicina (Volgograd)

AL LA OFICIALIGO DE ESPERANTO EN RUSIO

La 13-an de aprilo 2007 en Rusia Akademio pri Klerigo (Moskvo) okazos Internacia konferenco "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj". La aranĝo estas iniciatita de Rusia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco post la letero de Eŭropa Jurscienca Universitato Justo (EJU Justo) kaj REU, kiu enhavis proponon enkonduki Esperanton en studplanojn de rusiaj klerigejoj. La laboron de la konferenco partoprenos elstaraj rusiaj kaj eksterlandaj sciencistoj, Esperanto-instruistoj, esperantistoj, sociagantoj, politikistoj, reprezentantoj de amaskomunikiloj. La laborlingvoj de la aranĝo – la rusa kaj Esperanto. La rezulto de la konferenco fariĝos rezolucio, kiu devos esti la bazo por la decido de la Ministerio rilate studadon de Esperanto en rusiaj klerigejoj. *(Bedaŭrinde, la konferenco estis okazonta kelkajn tagojn post la finpretigo de tiu ĉi numero de REGo. La gazeto informos pri rezultoj de la konferenco en sekva numero. – G.K.)*

Gennadij Ŝilo, rektoro de EJU Justo

PROTOKOLO

de la 23-a Konferenco de Rusia Esperantista Unio
Tiĥvin, 07-09.03.2007
(enkadre de la 25-a Rusia Esperantista Kongreso)

La 7-an de marto 2007.

1. Organizaj demandoj. Elekto de la konferencaj gvidorganoj.

1.1. Estas registritaj 13 delegitoj kun voĉdonrajto[1].

1.2. Kunvengvidanto: Georgij Kokolija (Moskvo) – elektita unuanime.

1.3. Protokolantoj: Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk), Anatolij Sidorov (Sankt-Peterburg) – elektitaj unuanime.

1.4. Kalkulkomisiono: Aleksandr Milner (Moskvo), Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg), Jurij Karcev (Uljanovsk) – elektitaj unuanime.

1.5. G.Kokolija proponis, ke voĉdonado dum la Konferenco okazu per mandatoj.

Rezulte de la voĉdonado la propono ne estas akceptita:

por – 5 voĉoj,
kontraŭ – 5 voĉoj,
sindetenoj – 3 voĉoj.

1.6. Tagordo de la Konferenco:

1) Elekto de la konferencaj gvidorganoj.
2) Raporto de la Estraro de REU.
3) Raporto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU.
4) Pridiskuto de la raportoj.
5) Raportoj de klubaj reprezentantoj.
6) Diskuto pri la estonta agado.
7) Elekto de la Prezidanto de REU.
8) Elekto de la Estraro de REU.
9) Elekto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU.
10) Elekto de la Komisiitoj.
11) Amendoj en la Ĝenerala Regularo.
12) Diversaĵoj.
13) Akcepto de Decidoj de la Konferenco.

[1] Poste registriĝis ankoraŭ 6 personoj, entute en la Konferenco estis registritaj 19 delegitoj.



dum la Konferenco en Tiĥvin

La tagordo estas akceptita unuanime.

2. Raporto de la Estraro de REU.

2.1. La raporton prezentis la Prezidanto de REU Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja). *(Tekston de la raporto vidu en REGo № 1/2007, paĝoj 18-22).*

2.2. Financan raporton pri la jaro 2006 prezentis A.Grigorjevskij. *(Tekston de la raporto vidu en tiu ĉi numero de REGo).*

3. Raporto de la Kontrol-revizia Komisiono.

3.1. Raporton de la Kontrol-revizia Komisiono voĉlegis membro de la komisiono G.Terentjeva. La Komisiono konstatis, ke la agado de la Estraro estis konforma al la Statutaj celoj; la proklamitaj ĉefaj agaddirektoj fare de la Prezidanto kaj de la Estraro estis sisteme plenumataj. Laŭ la prezentita financa raporto eblas konkludi, ke la elspezoj estis faritaj konforme al la Statutaj celoj.

3.2. Decido de la Konferenco: la raporto de la Kontrol-revizia Komisiono estas aprobita unuanime.

4. Pridiskuto de la raportoj.

4.1 En la pridiskuto de la raportoj partoprenis entute 3 personoj: A.Grigorjevskij, G.Kokolija, Valentin Seguru (Moskvo).

4.2. Pritakso de la laboro de la Estraro de REU. Dum pridiskuto estis proponitaj du variantoj de la taksado:

1) Irina Gonĉarova (Odincovo) – pritaksi la agadon "bona",

2) G.Kokolija, V.Seguru – pritaksi la agadon "kontentiga",

Rezultoj de la voĉdonado:

variantο 1) – 9 voĉoj,
varianto 2) – 3 voĉoj,
sindetenoj – 0 voĉoj.

La Konferenco decidis taksi la laboron de la Estraro "bona".

5. Raportoj de klubaj reprezentantoj.

5.1. Pri la kluba agado raportis: R.Kudrjavceva (Jekaterinburga EK, Tjumena EK “Revo”, Ĉeljabinska EK), I.Gonĉarova (Moskva EK MASI), Valeria Cvetkova (Sankt-Peterburga E-societo “Espero-1” kaj klubo de malbone vidantaj esperantistoj “Amikaro”), A.Sidorov (Sankt-Peterburga E-societo “Espero-2”), Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburga Interlingvistika Rondo – SPIRo), Lubovj Malеĵ (Ivanova EK), Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvina EK).

5.2. En la pridiskuto de la raportoj partoprenis entute 6 personoj: V.Seguru, R.Kudrjavceva, A.Grigorjevskij, G.Kokolija, A.Sidorov, Maksim Griŝin (Moskvo).

Dum la pridiskuto estis faritaj jenaj proponoj por la kluba kaj regiona agado:

– fari en REGo aŭ en la retpaĝaro de REU sistemigitan laŭ regionoj priskribon de la aktuala kluba agado (V.Seguru);

– elekti en la kluboj respondeculojn pri interkluba informado (A.Grigorjevskij);

– kunlabori kun esperantistoj en senmovadaj ekssovetiaj respublikoj, peti por tio subvenciojn de UEA, fari varbafiŝojn por ekssovetiaj respublikoj pere de UEA (A.Grigorjevskij);

– peti por konkretaj projektoj subvenciojn de Socia Ĉambro (V.Seguru);

– peti subvenciojn por okazigo de Lingvaj Festivaloj en urboj, kie ne estas E-movado (A.Grigorjevskij);

– eldoni ruslingvan primovadan informilon (A.Sidorov).

La 8-an de marto 2007.

6. Diskuto pri la estonta agado.

A.Grigorjevskij kaj G.Kokolija raportis al la Konferenco pri la aktuala stato de aferoj pri la invito de UK al Rusio en 2009. Ili informis, ke la moskva iniciata grupo, subtenata de REU, preparis la bezonatajn dokumentojn, transdonis ilin al la Moskva Registaro kaj ricevis ties subtenon. La sekva REU-Estraro preparu dokumentojn por UEA.

Post pridiskuto de la informo la Konferenco decidis subteni la agadon de REU-Estraro pri la invito de UK al Rusio en 2009 aŭ postaj jaroj kaj rekomendis al la estonta REU-Estraro aktivigi la agadon en la bezonata direkto.

7. Elekto de la Prezidanto de REU.

7.1. Estas kandidatigitaj 5 personoj:

1) A.Grigorjevskij – propono de G.Kokolija,
2) J.Karcev – propono de Miĥail Ĉertilov (Moskvo),
3) R.Kudrjavceva – propono de G.Kokolija,
4) V.Seguru – propono de G.Kokolija,
5) G.Kokolija – propono de R.Kudrjavceva.

7.2. Ne konsentis kandidatiĝi 3 personoj: J.Karcev, R.Kudrjavceva, G.Kokolija.

7.3. Konsentis kandidatiĝi 2 personoj: A.Grigorjevskij kaj V.Seguru.

7.4. Ambaŭ kandidatoj je prezidanteco prezentis siajn programajn tezojn.

Andrej Grigorjevskij: Mi ne proponos ion novan, nek lanĉos novajn grandajn projektojn. Mi daŭrigos la antaŭan agadon, okupiĝos pri la aferoj, ligitaj kun la okazigo de UK en Rusio. Mi faros ankaŭ proprajn E-projektojn.

Valentin Seguru: Miaj prioritatoj estos regiona agado – novaj kluboj, renkontiĝoj, kunlaboro. Necesas daŭrigi kontaktojn kun la Ministerio pri Klerigo, provi kontakti la Ministerion pri Eksterlandaj aferoj, kiu respondecas pri ligoj kun Unesko.

7.5. Voĉdonilojn por la sekreta voĉdonado ricevis 11 delegitoj kun voĉdonrajto.

7.6. Post la voĉdonado kaj kalkulo de la voĉoj membro de la Kalkulkomisiono R.Kudrjavceva informis, ke la Prezidanto de la Kalkulkomisiono estis elektita A.Milner, kaj prezentis "Protokolon de la Kalkulkomisiono pri balotado dum REU-Konferenco".

7.7. Rezultoj de la sekreta voĉdonado:

por Andrej Grigorjevskij – 9 voĉoj,
por Valentin Seguru – 1 voĉo,
sindetenoj – 1 voĉo,
entute – 11 voĉoj.

7.8. La Konferenco aprobas la protokolon de la Kalkulkomisiono unuanime. Andrej Grigorjevskij per plimulto da voĉoj estas elektita kiel Prezidanto de REU.



Andrej Grigorjevskij, reelektita kiel Prezidanto de REU

8. Elekto de la Estraro de REU.

8.1. A.Grigorjevskij difinis principojn, laŭ kiuj estu elektataj estraranoj: atenti, ke estraranoj reprezentu ĉiujn regionojn de Rusio kaj ke en la Estraro estu personoj, kompetentaj pri informado, pri kluba (regiona) agado kaj renkontiĝoj, pri instruado, pri financoj kaj pri eksteraj rilatoj.

8.2. A.Grigorjevskij listigis la kandidatojn por la Estraro, kiuj anoncis sin antaŭ aŭ dum la Konferenco:

1) Nikolaj Gudskov (Moskvo),
2) Konstantin Ĥlizov (Irkutsk),
3) Aleksandr Osokin (Sankt-Peterburg),
4) Irina Gonĉarova (Odincovo),
5) Jurij Karcev (Uljanovsk),
6) Valentin Seguru (Moskvo),
7) Vladimir Bespalov (Soĉi).

Li proponis aldoni al la listo ankaŭ Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg).

8.3. Ne konsentis kandidatiĝi 1 persono: R.Kudrjavceva.

8.4. Elekto de la Vicprezidanto de REU.
V. Seguru proponis elekti el la proponitaj kandidatoj unu Vicprezidanton.
Rezulte de la voĉdonado la propono estas akceptita:

por – 10 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 3 voĉoj.

8.5. Estas kandidatigitaj 3 personoj:
1) V.Seguru – propono de A.Milner,
2) N.Gudskov – propono de V.Seguru,
3) I.Gonĉarova – propono de A.Grigorjevskij.

8.6. Ne konsentis kandidatiĝi 2 personoj: V.Seguru kaj I.Gonĉarova.
8.7. Voĉdonado por Nikolaj Gudskov kiel Vicprezidanto:

por – 14 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 0 voĉoj.

Nikolaj Gudskov estas elektita kiel Vicprezidanto de REU unuanime.


la estraranoj kun utilo uzas paŭzon dum la Konferenco

8.8. Elekto de la estraranoj.
G.Kokolija proponis du variantojn de elekto de la Estraro:
1) Elekti bloke ĉiujn 6 kandidatojn (krom Vicprezidanto),
2) Difini kvanton de la estraranoj kaj elekti ilin el 6 kandidatoj.
8.9. Dum pridiskuto A.Grigorjevskij subtenis la 2-an varianton – malpli grandan Estraron, V.Seguru subtenis la 1-an varianton, por ke estu reprezentitaj ĉiuj regionoj.
8.10. Rezultoj de la voĉdonado pri la proponoj de G.Kokolija:

varianto 1) – 7 voĉoj,
varianto 2) – 4 voĉoj,
sindetenoj – 3 voĉoj.

Estas akceptita la 1-a varianto – elekti bloke ĉiujn 6 kandidatojn.
8.11. Voĉdonado bloke pri 6 kandidatoj al la Estraro:

por – 12 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,

sindetenoj – 2 voĉoj.

Rezulte de la voĉdonado kiel membroj de REU-Estraro estas elektitaj: Vladimir Bespalov, Irina Gonĉarova, Konstantin Ĥlizov, Jurij Karcev, Aleksandr Osokin, Valentin Seguru.

La 9-an de marto 2007.

9. Elekto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU.

9.1. Elekto de la Prezidanto de la Kontrol-revizia Komisiono.

Kiel kandidato estas proponita 1 persono – Gennadij Basov (Moskvo).

Voĉdonado por G.Basov kiel la Prezidanto de la Kontrol-revizia Komisiono:

por – 11 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 2 voĉoj.

Rezulte de la voĉdonado Gennadij Basov estas elektita kiel la Prezidanto de la Kontrol-revizia Komisiono de REU

9.2. Elekto de la membroj de la Kontrol-revizia Komisiono.

Kiel kandidatoj estas proponitaj 3 personoj – G.Terentjeva, Roman Bolŝakov (Moskvo), A.Milner.

Voĉdonado por 3 kandidatoj bloke:

por – 12 voĉoj,
kontraŭ – 1 voĉoj,
sindetenoj – 0 voĉoj.

Rezulte de la voĉdonado kiel membroj de la Kontrol-revizia Komisiono estas elektitaj Galina Terentjeva, Roman Bolŝakov, Aleksandr Milner.

10. Elekto de la Komisiitoj.

10.1. G.Kokolija proponis elekti 3 personojn kiel Komisiitojn de REU:

1) Viktor Aroloviĉ (Moskvo) – Komisiito pri dokumentado de REU,
2) M.Bronŝtejn – Komisiito pri kultura agado,
3) Aleksandr Blinov (Ĉeboksari) – Komisiito pri prizorgado de novaj membroj.

10.2. Voĉdonado por 3 Komisiitoj bloke:

por – 11 voĉoj,
kontraŭ – 0 voĉoj,
sindetenoj – 2 voĉoj.

Rezulte de la voĉdonado kiel Komisiitoj de REU estas elektitaj Viktor Aroloviĉ, Mikaelo Bronŝtejn, Aleksandr Blinov.

11. Amendoj en la Ĝenerala Regularo.

11.1. La Konferenco diskutis bezonon de amendoj, koncernantaj REJM, en la Ĝenerala Regularo. Post priparolo de la stato de REJM depost kiam ĝi estis aligita

al REU kiel junulara sekcio estis konstatite, ke post portempa pli aktiva periodo nun ĝia agado estingiĝis.

11.2. Dum la pridiskuto estis faritaj 3 proponoj:

1) Precipe konsenti kun la amendo en la Ĝenerala Regularo – surbaze de la aktuala interkonsento inter REJM kaj REU fari apartan artikolon pri REJM kiel junulara sekcio de REU, plene memstara en sia agado kaj elektanta propran estraron – propono de A.Grigorjevskij,

2) Ne fari la amendon pro la reala nefunkcio de REJM – propono de G.Kokolija,

3) Se REJM plu restos malaktiva, uzi la nunan rajton de REU funkciigi propran junularan sekcion kaj elekti por ĝi gvidorganon (punkto 7.1 de la Ĝenerala Regularo) – propono de G.Kokolija.

11.3. Voĉdonado por la propono de A.Grigorjevskij:

por	– 2 voĉoj,
kontraŭ	– 4 voĉoj,
sindetenoj	– 8 voĉoj.

Rezulte de la voĉdonado la propono ne estas akceptita.

11.4. Post plia diskuto G.Kokolija proponis rekomendi al la Estraro daŭrigi la klopodojn pri aktivigo de la junulara movado en Rusio kaj kaze de reala ekfunkcio de REJM prepari amendojn en la Ĝenerala Regularo.

La propono estas akceptita unuanime.

12. Diversaĵoj.

12.1. M.Ĉertilov demandis, kial dum la Rusiaj E-Kongresoj ne estas plenumata la Kongresa Regularo, aparte punktoj 16÷18 pri la Kongresa Fondaĵo, kiu fakte ne ekzistas.

Post la pridiskuto estis konstatite, ke en multaj flankoj la Kongresa Regularo malaktualiĝis kaj bezonas ŝanĝojn.

G.Kokolija proponis rekomendi al la Estraro dum organizado de estontaj REK-oj sekvi la Kongresan Regularon kaj komisii al la Estraro prepari bezonatajn ŝanĝojn en la Kongresa Regularo konforme al la aktuala situacio.

La propono estas akceptita unuanime.

12.2. Vladimir Minin (Tomsk) turnis sin retmesaĝe al la Konferenco kun propono elekti alian moderiganton por la interreta dissendolisto de REU <reu-agado> anstataŭ G.Kokolija.

Post pridiskuto de la aktuala stato kaj administrado de <reu-agado> estas konstatite, ke en la listo ofte mankas interesaj diskutindaj temoj kaj, aliflanke, insultaj kaj ofendaj frazoj en mesaĝoj de kelkaj skandalemaj personoj malebligas konstruivan diskutadon kaj forpuŝas listanojn, precipe novaliĝintajn.

Malgraŭ la esprimita de G.Kokolija deziro eksiĝi de la posteno, la propono de V.Minin ne estas subtenita.

13. Akcepto de decidoj de la Konferenco.

DECIDOJ
de la 23-a Konferenco de REU

1. Taksi la laboron de la Estraro bona.
2. Aprobi la raporton de la Kontrol-revizia Komisiono.
3. Subteni la agadon de REU-Estraro pri invito de UK al Rusio en 2009 aŭ postaj jaroj kaj rekomendi al la estonta REU-Estraro aktivigi la agadon en la bezonata direkto.
4. Elekti la Estraron en la konsisto: Andrej Grigorjevskij – Prezidanto, Nikolaj Gudskov – Vicprezidanto, Vladimir Bespalov, Irina Gonĉarova, Konstantin Ĥlizov, Jurij Karcev, Aleksandr Osokin, Valentin Seguru.
5. Elekti la Kontrol-revizian Komisionon en la konsisto: Gennadij Basov – Prezidanto, Roman Bolŝakov, Aleksandr Milner, Galina Terentjeva.
6. Elekti Komisiitojn pri: dokumentado – Viktor Aroloviĉ, kultura agado – Mikaelo Bronŝtejn, prizorgado de novaj membroj – Aleksandr Blinov.
7. Komisii al la Estraro daŭrigi klopodojn pri aktivigo de la junulara movado en Rusio kaj kaze de reala ekfunkcio de REJM prepari bezonatajn amendojn en la Ĝenerala Regularo.
8. Komisii al la Estraro prepari bezonatajn ŝanĝojn en la Kongresa Regularo konforme al la aktuala situacio kaj rekomendi al la Estraro dum organizado de estontaj REK-oj sekvi la Kongresan Regularon.

Tiĥvin, la 9-an de marto 2007.

Protokolis: G.Terentjeva, A.Sidorov.
Finpretigo de la protokolo: la 29-an de marto 2007.

FUNKCIOJ EN LA NOVA ESTRARO

La nova Estraro dum retaj diskutoj disdividis la funkciojn sekvamaniere:

- **Nikolaj Gudskov** – kunordigado de la regiona/kluba agado (RKA), eldonado moskva;
- **Aleksandr Osokin** – financoj, RKA en Nord-Okcidento;
- **Irina Gonĉarova** – instruado, junularaj aferoj, RKA en Centra Rusio;
- **Jurij Karcev** – RKA en Volgio, eldonado ekstermoskva;
- **Konstantin Ĥlizov** – retaj aferoj, novaj projektoj, RKA en Siberio;
- **Vladimir Bespalov** – RKA en Suda Rusio;
- **Valentin Seguru** – kontaktoj kun nee-istaj organizoj;
- **Andrej Grigorjevskij** – renkontiĝoj, informado, individuaj membroj.

Krome, kiel la nova respondeculo pri la Libroservo de REU estis elektita Anatolij Sidorov (Sankt-Peterburg). La libroservo en Ĉeboksari daŭre funkcios.
Kiel la Komitatano A de UEA estas elektita Andrej Grigorjevskij. La nuna, kies mandato finiĝos ĉi-somere, estas Georgij Kokolija.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

FINANCA RAPORTO DE REU-ESTRARO POR 2006

En 2006 REU havis 97 individuajn membrojn, 9 familiajn membrojn, 132 aligitajn membrojn. La IM-kotizo estis 80 rub., el kiu ni 30 rub. pagis al REGo, se la persono estis abonanto; kolektiva kaj familia kotizoj – po 30 rub.

En la kaso la 1-an de januaro 2006 estis 32 779 rub., la 1-an de januaro 2007 – 40 200 rub. 19 kop. Grandparte tio ŝuldiĝas al multe pli aktiva aliĝado por 2007 ol por 2006.

Enspezoj por 2006:

7600 – kotizoj de 95 IM

544 – kotizoj de 2 alilandaj IM (kotizo: 8 eŭroj × 34 = 272 rub.)

4230 – kotizoj de 141 AM kaj FM

6000 – kotizoj de 3 novaj Dumvivaj Membroj (la enspezo ne enkalkuliĝas en la kurantajn enspezojn, sed estas metata en la fondaĵon “Dumvivaj membroj”)

300 – ekzamenoj de ĈALK

1169.60 – profito de la fondaĵo “Dumvivaj membroj”

1100 – REU-parto de la profito de EoLA en Jelec

Sume: 14943.60 rub.

Elspezoj por 2006:

2100 – REGo-abonoj por 7 kluboj: 14 abonoj (por ĉiu komenciĝinta deko da membroj – po unu, 150 rub.)

530 – REGo-abono por DM B.Kolker

2970 – repagoj po 30 rub. al REGo, por REU-membroj-abonantoj

600 – vojaĝkostoj de A.Grigorjevskij al Moskva parta estrara kunveno en septembro 2006

1400 – vojaĝkostoj de I.Gonĉarova al la Ĉeboksara estrara kunveno en oktobro 2006

400 – telefonvokoj, retaĵoj, REU-bulteno, membrokartoj (A. Grigorjevskij)

818.50 – produktado kaj dissendado de REU-aliĝiloj por 2007

1624 – dumjaraj poŝtelspezoj por disssendo de la Bulteno, Jarlibro, membrokartoj kaj RET-07-reklamilo (M.Ĉertilov)

2122.14 – pago al UEA pro 111 aligitaj membroj

420 – pago por la domajna nomo <reu.ru> (15 dolaroj)

1000 – subvencio al Vjaĉeslav Ivanov (ĉefe por la projekto “E-novosti”)

125 – 50 novaj LF-afiŝoj senpage transdonitaj al la organizantoj de LF-1 en Moskvo

150 – senpaga aligo de reprezentanto de Volgograda EK “Espero” al RET-06

Sume: 14259.64 rub.

Investaj elspezoj-enspezoj

(ne enkalkulataj en la ĝenerala bilanco, ĉar ne povas korekte reprezentiĝi en la unujara skalo)

Elspezoj:

18000 – eldono de la libro de M. Bronŝtejn "Legendoj pri SEJM" (feb. 2006)
5800 – koloraj ruslingvaj reklamiloj (dec. 2006)
1900 – kolora informletero pri REK kaj EoLA en 2007 (dec. 2006)

Enspezoj:

9500 – repago de M.Bronŝtejn pro jam venditaj libroj (aŭg. 2006)
170.50 – vendoj de la koloraj informiloj (dec. 2006)

Fondaĵoj

Neniuj movoj okazis post septembro 2006, kiam estis submetita la antaŭa raporto.

Notoj

Daŭre necesas noti, ke pli-malpli ekvilibraj niaj elspezoj estas ***nur*** dank' al volontula kaj senrekompenca laboro de niaj aktivuloj-estraranoj.

Preskaŭ senpage estis produktitaj la Jarlibro 2006, membrokartoj, proprakoste estis faritaj preskaŭ ĉiuj "oficaj" vojaĝoj ktp.

Andrej Grigorjevskij, prezidanto de REU

INFORMO DE ĈALK

La 20-an de februaro okazis ekzameno de la Ĉefa Atesta kaj Lingva Komisiono de REU. Ekzamenis I.Gonĉarova kaj N.Gudskov.

Sukcese ekzameniĝis laŭ postuloj de la nivelo "A" kvar personoj (membroj de la klubo MASI):

1) Aleksej Legornev – perfekte;
2) Natalja Nikolajeva – perfekte;
3) Ilja Miĥasenko – bone;
4) Svetlana Riĵova – kontentige.

KVIN KOMITATANOJ B REKTE ELEKTITAJ

Kvin kandidatoj sin anoncis por la elektado de komitatanoj B, kiuj reprezentas la individuajn membrojn en la supera organo de UEA. Ĉar fine de la jaro 2006 la individuaj membroj de UEA nombris pli ol 6000, povis esti elektotaj sep komitatanoj B. Ĝis la limdato, la 28-a de februaro, liveris kompletajn dokumentojn kvin kandidatoj. Sekve ili estas aŭtomate elektitaj kaj poŝta voĉdonado de membroj ne estas bezonata.

La kvin komitatanoj B, kies oficperiodo komenciĝos je la unua tago de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, estas Marija Beloševic (Kroatio), Tomasz Chmielik (Pollando), Johan Derks (Nederlando), István Ertl (Luksemburgio) kaj Jukka Pietiläinen (Finnlando). Beloševic, Ertl kaj Pietiläinen membras ankaŭ en la nuna Komitato, elektita en 2004. Chmielik kaj Derks eniros la Komitaton kiel novaj membroj.

Marija Beloševic (nask. 1965) estas konata i.a. kiel longtempa aktivulo kaj estrarano de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista. Tomasz Chmielik (1957) estas aktiva eldonisto kaj estrarano de Esperantlingva Verkista Asocio. Johan Derks (1940) aktivas i.a. pri eŭropa agado kaj estis estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio. István Ertl (1965) estas Esperanta verkisto kaj tradukisto kaj laboris dek jarojn kiel redaktoro de la revuo "Esperanto". D-ro Jukka Pietiläinen (1966) funkciis i.a. kiel prezidanto de Esperanto-Asocio de Finnlando kaj lastatempe kiel komisiito de UEA pri informado.

Laste la komitatanoj B estis elektitaj sen poŝta balotado en 1992. Kvankam en la antaŭa jaro UEA havis pli ol 8000 individuajn membrojn, unuafoje dum 60 jaroj, por naŭ lokoj de komitatanoj B anonciĝis nur ok kandidatoj. En kvar postaj fojoj okazis balotoj, en kiuj partoprenis 30-33% de la individuaj membroj. Pri la ses lokoj de komitatanoj B en la nun deĵoranta Komitato konkursis antaŭ tri jaroj 16 kandidatoj. Voĉdonis tiam 1491 membroj, t.e. 31,4%.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVA GRUPO TRA MEMBRECO EN REU

En Tverj fondiĝis nova E-klubo. En ĝi unuiĝis personoj, lernintaj E-on memstare kaj diverstempe membriĝintaj en REU kiel individuaj membroj. Lastatempe aperis ankaŭ aktivulo, kiu volis havi ne nur virtualajn, sed ankaŭ ĉeestajn kunvenojn. Li ricevis de REU la adresojn de la samurbanoj kaj sukcesis kunvenigi ilin. La nova grupo renkontiĝas unufoje semajne. Jam okazis tri kunvenoj. La klubon oni decidis nomi "Ekvinokso".

(esperanto-rus-informoj)

UNUAFOJE ĈEFDELEGITO EN NEPALO

Laŭ propono de la landa asocio la Estraro de UEA nomumis s-ron Mukunda Raj Pathik Wagle la unua Ĉefdelegito por Nepalo. Pasintjare Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) estis akceptita kiel aliĝinta Landa Asocio de UEA kaj sekve ĝi ricevis la rajton proponi Ĉefdelegiton. Laŭ la Regularo pri delegitoj Ĉefdelegito povas esti nur en landoj, kies landa asocio estas aliĝinta al UEA.

S-ro Mukunda Raj Pathik Wagle estas unu el la plej spertaj movadanoj en sia lando. Li estas individua membro de UEA ekde 1991 kaj fakdelegito pri instruado, poezio kaj turismo ekde 1997. Ekde la akcepto de NEspA en UEA li ankaŭ reprezentas sian asocion en la Komitato de UEA kiel observanto.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

PLI DA MEMBROJ EN REU

Jam komence de marto la kvanto de membroj en REU superis la finan nombron por la antaŭa jaro – kiu mem estis rekorda kompare al la antaŭaj ekde 2000. La novaj aliĝoj daŭre venas kaj por komenco de aprilo la membraro jam atingis 338 personojn (pasintjare estis 286).

Laŭ mia proksimuma pritakso REU allogis jam pli ol duonon de ĉiuj aktivaj es-

perantistoj de la lando, sed nur malgrandan parton de la entuta esperantistaro, inkluzive de tiuj, kiuj almenaŭ iom uzetas aŭ posedas la lingvon (da tiuj estas kredeble ĉ. 1000-1500).

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

PLI OL 6000 INDIVIDUAJ MEMBROJ ANKAŬ EN 2006

UEA spertis ioman malkreskon de sia membraro en 2006, kiam ĝi registris 6066 individuajn kaj 11732 aligitajn membrojn. En 2005 la nombroj estis respektive 6107 kaj 12253. Estis entute 17798 membroj en 117 landoj, dum en 2005 temis pri 18360 membroj en 113 landoj. La junaj membroj de UEA samtempe apartenas al la junulara sekcio TEJO, kiu pasintjare havis 515 individuajn (533 en 2005) kaj 1979 (2074) aligitajn membrojn.

Malpli da individuaj membroj estis antaŭvideble, ĉar la influo de Universala Kongreso al ilia nombro estis malpli forta ol en 2005. La UK en Florenco estis iom malpli granda ol tiu en Vilno (resp. 2209 kaj 2344 aliĝintoj), sed krome pli granda parto de la Florencaj kongresanoj estis regulaj membroj. En la kongreslando Italio estis 59 pliaj membroj, kiuj pli-malpli egalis la falon en Litovio (-61), sed la Florenca UK ne sufiĉe plimultigis la membraron en najbaraj landoj de Italio por kontraŭpezi la perdojn ĉe tiuj de Litovio. La "kongresa efiko" ĉiam tuŝas la nombron en la kategorio Membro kun Jarlibro, kiu pasintjare notis minuson de 59. Ĉar estis entute 41 individuaj membroj malpli, aliaj kategorioj do kresketis.

La distribuo inter la diversaj kotizkategorioj estis: Membroj kun Gvidlibro 375 (388 en 2005), Membroj kun Jarlibro 1368 (1408), Junaj Membroj kun Jarlibro 342 (361), Membroj-Abonantoj 2862 (2842), Junaj Membroj-Abonantoj 132 (130), Dumvivaj Membroj 824 (821), Junaj Dumvivaj Membroj 25 (29), Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 50 (42), Junaj Dumvivaj Membroj kun Jarlibro 16 (13), Honoraj Membroj 64 (65), Membroj de Honora Patrona Komitato 8 (8).

Kun 670 individuaj membroj Francio retenis sian pintan pozicion super Germanio (546) kaj eĉ plifortigis ĝin, ĉar en 2005 ĝia nombro estis 665 kontraŭ 568 en Germanio. Sur la tria loko estis Japanio kun 410 individuaj membroj (401). (En la provizora statistiko de la kuranta jaro Japanio, dank' al la UK en Jokohamo, staras jam nevenkeble ĉe la pinto kun preskaŭ 800 membroj!) La aliaj landoj kun pli ol 100 individuaj membroj pasintjare estis Usono 361 (363), Brazilo 360 (365), Italio 284 (223), Nederlando 262 (260), Hispanio 186 (154), Belgio 174 (171), Britio 171 (169), Svedio 169 (188), Finnlando 167 (176), Rusio 167 (239), Ĉinio 153 (136), Pollando 134 (170), Hungario 111 (112) kaj Svislando 111 (98).

Senteble falis la nombro de aligitaj membroj, t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estas indviduaj membroj de UEA. Ŝanĝoj en ilia nombro tamen ne respegulas la efektivan evoluon en la koncernaj asocioj, ĉar multaj asocioj anoncas al UEA malpli grandan nombron ol ili vere havas. En la statistiko aperas nur la nombroj, laŭ kiuj la asocioj kotizis al UEA. Du trionoj el la malkresko de 521 aligitaj membroj okazis en Vjetnamio (-335), kies asocio ne povis pagi laŭ la antaŭa nombro. Malkreskoj okazis ankaŭ en Korea Respubliko (-87), Belgio (-82), Japanio (-63), Brazilo (-54) kaj Svedio (-46). Tre rimarkinde estas, ke en Francio, kie estis

pli da individuaj membroj, ankaŭ la nombro de aligitaj membroj kreskis per 97.

La revuo "Esperanto" havis 4089 pagitajn abonojn, t.e. je 5 pli ol en 2005. La nombro de pagitaj abonoj de la junulara revuo "Kontakto" estis 893 (-29).

Laŭlanda statistiko de la membraro de UEA aperas en la aprila numero de "Esperanto".

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ MEMBROKARTOJ

La membroj de REU por 2007, aliĝintaj antaŭ la komenco de marto, ricevis novajn membrokartojn de REU – ĉi-foje plenkolorajn.

La kartoj surhavas la nomon de la membro, indikon pri la membrokategorio, la nomon de la klubo, se temas pri aligita membro, kaj pri REJM-membreco, se estas juna membro. La kartoj de la REJM-membroj havas iom alian kolorarangôn ol la ceteraj.

La membrokartoj estis disdonitaj dum REK kaj EoLA en Tiĥvin kaj dissenditaj poŝte al la neĉeestintoj. Por tiuj, kiuj aliĝis post la komenco de marto, la kartoj estos preparitaj kaj dissenditaj aprile.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2007

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Ĉerneckij Nikolaj (Jaroslavla reg.), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Dmitrijev Nikolaj (Moskvo), Enken Boris (Moskvo), Glaznica Tatjana (Ĉeljabinsk), Grigorjevskij Andrej (Ĉuvaŝio), Ĥajbulin Jevgenij (Moskvo), Ĥomjakov Igorj (Tverj), Ĥrustaljov Aleksandr (Dimitrovgrad), Kabirova Natalja (Jekaterinburg), Kaznaĉejeva Natalja (Kropotkin), Kolodin Miĥail (Sankt-Peterburg), Koot Rudi (Nederlando), Kozlov Aleksej (Niĵnij Novgorod), Kudrjavcev Viktor (Jekaterinburg), Laptev Viktor (Ĉeljabinsk), Maleĵ Ljubovj (Ivanovo), Medvedeva Marija (Saratov), Melnikov Aleksandr (Rostov-Don), Morev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Muraŝev Aleksandr (Sankt-Peterburg), Neĉajev Nikolaj (Irkutsk), Obrezkov Andrej (Ivanovo), Osipova Arina (Jekaterinburg), Osokin Aleksandr (Sankt-Peterburg), Rjazancev Andrej (Murmansk), Sanajeva Jelena (Perma reg.), Sipoviĉ Valerij (Moskva reg.), Ŝerov-Ignatjev Ivan (Sankt-Peterburg), Terjoĥin Vladimir (Jekaterinburg), Uspenskaja Jelena (Jekaterinburg), Voropaj Jekaterina (Moskvo), Voropaj Julija (Moskvo), Zaidova Tatjana (Ivanovo)

FAMILIAJ MEMBROJ

Ivanova Marina (Moskvo), Grigorjevskaja Natalja (Ĉuvaŝio), Kozlova Jana (Niĵnij Novgorod), Kudrjavceva Rafija (Jekaterinburg), Muraŝeva Varvara (Sankt-Peterburg), Poljanskaja Jelena (Samara)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko (JEAĈR) (5 membroj): *Belkin Jevgenij, Ivanov Aleksandr, Nikitina Nadeĵda, Saljaeva Natalja, Zaikina*

Jekaterina

Moskva EK MASI (+ 6 membroj): *Elit Ivan, Gamaleja Anna, Isajeva Oljga, Komarova Julija, Laŝin Svetozar, Nikonov Dmitrij*

Grandan dankon al dumviva membro Valeria Cvetkova pro la donaco, farita al la kaso de REU!

Murmanska EK "Murmano" (15 membroj): *Cibuljskaja Ljudmila, Goriĉenko Oljga, Gorohova Natalja, Ĵeltuĥin Artemij, Kozjuberda Anastasija, Krajev Aleksandr, Levaja Maja, Makarov Aleksej, Malanjuŝkina Tamara, Peredruk Jelena, Poĵilova Ljudmila, Romanova Valentina, Ŝtokalova Olesja, Trubkina Nelli, Uljanova Galina*

Samara E-klubo (13 membroj): *Agafonova Ljudmila, Aksjonov Aleksandr, Aleksejeva Oljga, Alfjorova Jelena, Aljakina Ljudmila, Balabancev Maksim, Jermolov Sergej, Kaplun Jelizaveta, Kuznecova Jelena, Lisijenkova Valentina, Prilepskaja Marija, Purigina Emilija, Suslov Vjaĉeslav*

E-Societo "Espero" (Sankt-Peterburg) (+2 membroj): *Kuleŝova Nadeĵda, Skvorcova Natalja*

Tiĥvina E-klubo (+5 membroj): *Denisova Oljga, Kaĉalova Zoja, Koroteckij Aleksandr, Kuprijanova Marija, Rajskaja Natalja*

Volgodonska E-grupo (5 membroj): *Afanasjeva Aljona, Afanasjeva Jelena, Fajzulin Grigorij, Koteljnikov Aleksandr, Koteljnikova Jekaterina*

Volgograda E-klubo "VENKO" (16 membroj): *Ĉugunkin Ilja, Ĉugunkina Anastasija, Ĉugunkina Oljga, Dronov Igorj, Dronova Viktorija, Dumler Aleksej, Guriljova Dina, Kaŝirin Aleksej, Krasnokutskij Anatolij, Mironov Nikolaj, Mironova Irina, Prosvirov Oleg, Ŝaronov Oleg, Tikejeva Saulja, Varlamova Valerija, Zagidulin Jurij*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>.

KOTIZOJ DE REU POR 2007

Individua kotizo – 80 rubloj (por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por loĝantoj de aliaj landoj – 8 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron kaj/aŭ Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj.

Dumviva kotizo – 2000 rub. (por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por loĝantoj de aliaj landoj – 200 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 30 rub. (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio sama kiel por individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 30 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en REU-aranĝoj por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 160 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.


Rabatita abono de REGo – 150 rub. (ekster Rusio kaj KSŜ – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Membroj de REU aŭtomate iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn REGo-abonpagojn sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <kasisto@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

FORPASIS VIKTOR PETROVIĈ GRIGORJEV

La 9-an de februaro 2007 en Moskvo forpasis pro koratako iama membro de la Akademio de Esperanto profesoro Viktor Petroviĉ Grigorjev. Li estis tre aŭtoritata rusia lingvisto, aŭtoro de dudeko da libroj kaj tricento da artikoloj (i.a. redaktoro de Esperanto-rusa vortaro de Bokarjov): <http://www.ruslang.ru/bibl/grigor_ev.pdf>. Li faris tre multe por popularigi interlingvistikajn kaj esperantologiajn ideojn inter sovetiaj kaj rusiaj lingvistoj. Interalie, li estis oficiala oponanto ĉe la defendo de mia disertacio kaj ankaŭ de aliaj disertacioj pri interlingvistikaj temoj – de Dina Lukjanec, Leonid Mjasnikov kaj Aleksandr Melnikov.



Boris Kolker (Usono)

Eksciu, ke...

AGADO POR UK EN RUSIO

La registaro de Moskvo subtenis la ideon pri la invitado de Universala Kongreso de Esperanto al Rusio en 2009 aŭ 2010. La propono estis prezentita al la urba registaro nome de la Moskva iniciata grupo, subtenita de REU.

Ĉefrolis en la "trabatado" tra la kuluaroj de la burokratia aparataro moskvaj altranguloj-esperantistoj Gennadij Ŝilo kaj Valerij Sipoviĉ. Subtene por ili en tiu ĉi unua etapo agadis Svetlana Smetanina, Nikolaj Gudskov, Mikaelo Ĉertilov, Liana Tuĥvatullina, Garik Kokolija kaj Andrej Grigorjevskij.

La unuaj esperigaj rezultoj estis atingitaj jam en decembro 2006, la agado daŭris post la longegaj novjaraj festoj. Finfine meze de februaro 2007 la dokumentojn aprobis kaj rezoluciis pri la subteno la urbestro de Moskvo Jurij Luĵkov. Sekvasemajne okazis tre sukcesa renkontiĝo de niaj reprezentantoj kun la moskva ministro pri internaciaj ligoj kaj turismo I.Orĝonikidze, kiu jam agis por plenumi koncernan komision.

Konkretiĝis la traktadoj per "ekspertnivela" kunveno, kiu okazis la 27-an de februaro. Estis interkonsentitaj la formuloj de la dokumentoj, laŭ kiuj Moskvo prezentos diversmanieran praktikan kaj materialan helpon por la okazigo de la Kongreso, se UEA decidos okazigi ĝin en nia ĉefurbo. La registaro preparos kaj transdonos al la iniciata grupo ĉiujn oficialajn garantiojn, bezonatajn por prezenti al UEA validan inviton.

Pri la sukcesaj esploroj estis tuj informita la Centra Oficejo de UEA. Tamen laŭ la Ĝenerala Direktoro de UEA ni iris al la konkretaĵoj tro longe kaj jam estas malfrue kandidati por la jaro 2009. El liaj vortoj sekvas, ke en tiu jaro UEA preferus havi UK-on en Pollando.

La pozicion estas facile kompreni: Pollando estas EU-lando, sen problemoj pri vizoj por eŭropanoj, krome en 2009 estos jubilea jaro – 150 jaroj ekde la naskiĝo de L.L.Zamenhof...

Niaj argumentoj estas, ke Zamenhof ne estis fremda por Moskvo – li kelkajn jarojn studis en Moskva universitato, samtempe preparante la finan version de nia lingvo. Gravas ankaŭ, ke en Rusio neniam ĝis nun okazis Universala Kongreso de Esperanto – dum en la sama Pollando UK gastis jam plurfoje.

Sed decidas pri la UK-okazigo UEA – nia afero estas interesigi ĝin, prezentante nian varianton. La moskva registaro pretas subteni la inviton ankaŭ por 2010, kaj por la postaj jaroj eblas diskuti eĉ pri pli multaj urboj.

La agado daŭras.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

BEF-4 NE OKAZOS

La 10-an de februaro en Kaliningrad okazis Konferenco de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU). La Konferenco akceptis la agadraporton kaj la financan raporton de la Komitato de KREU kaj elektis ties novajn gvidorganojn. Interalie, la Konferenco decidis nuligi la 4-an Baltan Esperanto-Forumon (kiu devus okazi en Kaliningrad en julio 2007) pro sanproblemoj kaj/aŭ granda profesia premo de la ĉefaj organizantoj. KREU okazigos nur semajnfinan renkontiĝon omaĝe al la 100-jariĝo de la organizita Esperanto-movado en la urbo.

KREU

LA NOMBRO DE ALIĜINTOJ AL JOKOHAMO SUPERIS 1500

Ĝis la 08-a de aprilo 1505 kongresanoj el 55 landoj aliĝis al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Jokohamo de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Sekve la Jokohama UK jam superis la definitivajn nombrojn de aliĝintoj de tri ekstereŭropaj UK-oj de la lastaj dek jaroj: Adelajdo en 1997 (1224), Tel-Avivo en 2000 (1212) kaj Fortalezo en 2002 (1484), dum la kvara – Pekino en 2004 (2031) – ankoraŭ superas Jokohamon en la statistiko. La unua japana UK en Tokio en 1965 arigis 1710 aliĝintojn. Ĝis nun la nombra evoluo de la Jokohama UK preskaŭ precize sekvas tiun de la UK en Florenco, kies fina nombro estis 2209 kongresanoj el 62 landoj.

Pli ol duono, 826, de la aliĝintoj estas el la gastigonta lando. Ĝiaj najbaroj Korea Respubliko kaj Ĉinio liveris respektive 74 kaj 31 aliĝintojn. La aliaj landoj kun minimume 10 aliĝintoj ĝis nun estas Francio (76), Germanio (54), Litovio (34), Italio (33), Nederlando (29), Pollando (28), Usono (23), Britio (20), Hispanio, Rusio kaj Svedio (po 19), Brazilo (18), Svislando (17), Bulgario (16), Kroatio (15), Aŭstralio kaj Finnlando (po14), Belgio (13), Ĉeĥio (12), Hungario (10).

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

PRINTEMPA RENKONTIĜO EN VJETNAMIO

Organizo de ses sinsekvaj printempaj renkontiĝoj indas esti konsiderata kiel tradicio. Fakte, ekde la jaro 2002, post la Novjaro laŭ la luna kalendaro, Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) regule organizas en sia sidejo renkontiĝon inter ĉiuj esperantistoj loĝantaj en Hanojo.

Ĉi-jare la renkontiĝo okazis la 18-an de marto, ne en la sidejo, sed en Hanoja Fremdlingva Universitato, loko de la venonta Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK-63). Kaj ĝi estis titolita "Renkontiĝo inter studentoj de Fremdlingva Universitato kaj vjetnamaj esperantistoj". Ĝi estis organizita dank' al la kunlaboro de VEA, VEJO, la universitata Unio de studentoj, la Unio de Junuloj. Ĉirkaŭ 200 personoj partoprenis, plejparto el ili estas junuloj.

Post kanto de la nacia kaj de la Esperanta himno "La Espero" komenciĝis la kunveno. S-ro Vu Xuan Hong, membro de Nacia Asembleo, Prezidanto de Unio de Amikecaj Organizoj, memorigis la rolon de Esperanto en Vjetnamio dum la milito, kaj nuntempe en la integriĝo de Vjetnamio en la mondan komunumon. Fakte, por

ni, vjetnamoj, Esperanto ludas la rolon de ponto por interkompreniĝo kaj efika ilo por popola diplomatio. S-ro Hong emfazis, ke la okazigo de IJK en Vjetnamio estas granda honoro por la tuta lando, kaj tio ne estas la zorgo nur de vjetnamaj esperantistoj, de junuloj sed de la tuta lando. Li promesis alporti al IJK plenan subtenon de la ŝtato.

S-ro Nguyen Van Loi, prezidanto de VEA kaj samtempe Rektoro de la Fremdlingva Universitato, promesis, ke la Universtato kreos favorajn kondiĉojn por okazigo de IJK, kaj alvokis la studentojn lerni Esperanton.

Oni legis la salutleteron de Esperanto-Asocio de Ho Chi Minh urbo. S-ro Van Toan, prezidanto de la Studenta Organizo, kuraĝigis la studentojn lerni Esperanton, kiu estas tre facile lernebla por bone servi IJK-n. Li konsideras organizon de IJK kiel ĉefa tasko en la jaro 2007.

Estas decidite, ke malfermiĝos nova kurso de Esperanto por tiuj, kiuj ankoraŭ ne reĝistriĝis, kaj por tiuj, kiu pro ajna kialo ne regule partoprenis en la nunaj klasoj.

Grava decido estis la onta kreado de Esperanto-klubo ene de la Universitato por organizi regulajn kursojn de Esperanto, paroligi, korespondi, kanti.

Kantoj, ludoj kaj loterio varmigis la etoson de la renkontiĝo.

(landa agado)

ESPERANTO EN PEDAGOGIA UNIVERSITATO

La 7-an de februaro 2007 en Vilnius, en Pedagogia universitato (pedagogia kaj psikologia fakultatoj) komenciĝis instruado de Esperanto (la unua grado) kiel de libere elektebla studobjekto. Por la kurso registriĝis pli ol 40 studentoj de tiu universitato. La lekcioj daŭros ĝis fino de tiu ĉi printempa studduonjaro. Instruas doktoranto de la Instituto pri kulturo, filozofio kaj arto en Vilnius juna esperantisto Gediminas Degesys. Estas preparita programo kaj priskribo de la duonjara studado, ĝi daŭros 80 akademiajn horojn. La programo inkluzivas ne nur rektan instruadon de Esperanto, sed ankaŭ konatigon de studentoj kun problemoj de internacia lingvo ĝenerale, eblojn de Esperanto kiel de internacia lingvo, historion de Esperanto en la tuta mondo kaj en Litovio speciale. Estas preparita listo de rekomendata literaturo por studentoj. Ĉiuj studentoj fine de la studado devos verki teman referaĵon. Tiu ĉi jam estas la tria litova universitato, kie Esperanto estas instruata (la unuaj du nuntempe estas la Universitato de Šiauliai kaj Kaŭna humanisma fakultato de Vilna universitato).

(esper-inform)

ORATORA KONKURSO EN JOKOHAMO

En la 92-a UK en Jokohamo denove okazos Oratora Konkurso por junularo. La precizaj dato kaj loko estos anoncitaj en la Kongresa Libro. Rajtos partopreni gejunuloj ĝis 30-jaraj, kiuj aliĝis al UK. Partopreno estos senpaga, sed la kandidatoj devos skribe anonci sin minimume unu tagon antaŭ la konkurso al la estrarano pri kulturo s-ino Claude Nourmont <moonmont@pt.lu>.

La junaj oratoroj povos elekti inter kvar temoj:

– Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto;
– Kiel la reto ŝanĝas la Esperanto-movadon?
– Ĉu ni lernas el pasinteco?
– Sciencfikcio – ĉu fantazio aŭ aŭguro?

Oni devos paroli pri la elektita temo libere, sen antaŭpreparita teksto, sed oni rajtos uzi memorigajn notojn. La maksimuma daŭro de parolado estos 10 minuitoj. La paroladojn oni taksos el vidpunktoj enhava, lingva, stila kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro. La plej bonaj konkursantoj ricevos libropremiojn.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

KONKURSO PRI JUBILEA SIMBOLO POR LA 100-JARA UEA

En 2008 Universala Esperanto-Asocio estos 100-jara. Por ekhavi grafikan identigilon, kiu kunligu ĉiaspecajn aktivaĵojn tra la mondo okaze de tiu festo, la Estraro de UEA lanĉis konkurson pri jubilea simbolo.

La serĉata simbolo emfazu la 100-jaran historion de UEA kaj la daŭran aktualecon de ĝiaj celoj kaj idealoj. Ĝi estu elvoka, laŭeble simpla kaj uzebla presite kaj elektronike. Ĝi estu ĉu unukolora, ĉu plurkolora sed ankaŭ unukolore uzebla. La simbolo estos uzata nur lige kun la festado de la 100-jariĝo de UEA, kaj ĝi ne anstataŭos la ĝeneralajn movadajn simbolojn (verda stelo, simbolo de la Jubilea Jaro 1987 k.a.).

En la konkurso rajtas partopreni ĉiuj, ankaŭ neesperantistoj. Oni rajtas partopreni per pli ol unu konkursaĵo. La gajninto ricevos premion de 500 eŭroj. La rajtoj pri la premiita konkursaĵo, inkluzive de ĝia eventuala adapto, apartenos al UEA. Pri la aljuĝo decidos la Estraro de UEA.

Oni sendu la konkursaĵojn ĝis la 30-a de junio 2007 al Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; aŭ rete al <simbolo@co.uea.org>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

"FAMILIA ESPERANTO" RENASKIĜIS KOLORA

Post dujara interrompo reaperis la bulteno "Familia Esperanto" sub la sceptro de nova redaktoro, Claude Rouget el Norvegio. "Familia Esperanto", kies subtitolo estas "Cirkulaĵo por Esperantlingvaj paroj kaj familioj", estas oficiala organo de Rondo Familia de UEA. La nova numero estas kolore ilustrita, 20-paĝa, kaj enhavas i.a. raportojn pri novjaraj Esperanto-aranĝoj, inviton al la Internacia Infana Kongreseto en Jokohamo, porinfanajn rakontojn kaj versaĵojn, spertojn de diverslandaj Esperanto-familioj kaj resuman raporton pri la pasinta jardeko de Rondo Familia.

La bulteno estas legebla en la retejo de Rondo Familia <http://uea.org/rondo_familia>, kie oni povas legi ankaŭ ĝiajn antaŭajn numerojn. Por familioj, kiuj ne havas ret-aliron, oni konsideras ankaŭ paperan eldonon. Por ebligi tion subtenaj kotizoj de ne malpli ol 10 eŭroj estas bonvenaj al la UEA-konto idoj-p de la Rondo.

Rondo Familia estis fondita en 1994, la Internacia Jaro de Familio, por ligi es-

perantistajn familiojn. Ĝi registras familiojn kun aŭ sen infanoj, sendepende de ilia movada engaĝiĝo. La Rondo estas gvidata de komisiono, kies kunordiganto estas Amri Wandel kaj aliaj membroj la redaktoro Claude Rouget, Jouko Lindstedt kaj Bert Schumann. Lindstedt estas administranto de la retlisto denask-l <www.helsinki.fi/~jslindst/denask-l.html>, kaj Schumann – komisiito pri Internacia Infana Kongreseto <http://www.uea.org/kongresoj/iik.html>.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

ĈU LA PLEJ MALJUNA ESPERANTISTO VIVAS EN ROMO?



En Romo esperantistino Zoraide Carrubba Del Giudice fariĝis 103-jaraĝa la 25-an de marto 2007. Delegacio de la roma E-klubo vizitis ŝin, por tutkore festi la naskiĝdatrevenon de tiu, kiu, plej verŝajne, estas la plej altaĝa esperantisto en la mondo. En 2004, okaze de ŝia 100-jariĝo, la urbo Romo, je la ĉeesto de la Urbestro, gratulis ŝin per publika manifestacio.

<http://www.ikue.org/roma/zoraide103.htm>

AMIKUMU!

La 18-an de februaro ni lanĉis la retejon *Amikumu*-n <www.amikumu.com> pro la Semajno de Internacia Amikeco. Per *Amikumu* vi povas facile amikumi kun aliaj esperantistoj tra la tuta mondo. Vi povas trovi proksimajn amikojn, homojn kun samaj interesoj kaj ankaŭ libere diskuti en niaj novaj babilejo kaj forumo.

En *Amikumu* ĉiu povas krei profilon en kiu li aŭ ŝi prezentas sin. Vi povas aldoni, pri kio vi interesiĝas, kaj alŝuti fotojn. Krome vi povas en *Amikumu* serĉi esperantistojn, ekzemple laŭ interesoj, kaj aldoni certan personon – amikon – al via konto. Tio similas al la ebloj, kiuj donas la retejoj de *MySpace* kaj *LiveJournal*.

Verŝajne la plej interesa opcio en *Amikumu* estas la ebleco vidi ĉiujn uzantojn sur *Google Maps*. Tiel oni povas vojaĝi ĉirkaŭ la mondo, vidante kie kiu loĝas. Eĉ estas aparta paĝo kiu montras al vi liston de uzantoj ordigitaj laŭ proksimeco al vi, do vi povas malkovri nekonatajn esperantistojn eĉ en via urbo!

Ni konstatis, ke ne ĉiam facilas ekhavi kontaktojn kun esperantistoj, ĉu en propra regiono, ĉu kun samaj interesoj. Momente, ĉefe post longa aktivado ene de la

movado kaj ĉefe per renkontiĝoj, eblas ekhavi internacian amikaron. Per *Amikumu* vi povos pli facile interkonatiĝi kaj plene uzi la avantaĝojn de Interreto.

Estas multaj planoj pliampleksigi la potencojn de *Amikumu*. Ekzemple ni intencas doni al vi la eblecon krei grupojn (alternativon al *Jahugrupoj*), vikiojn kaj blogojn. Sendu al ni viajn proponojn por ke ni ĉiuj povu pli facile amikumi internacie! Do, ek! Iru al <www.amikumu.com> kaj amikumu!

Chuck Smith

MOVADA FOIRO KAJ KLERIGA TAGO EN JOKOHAMO

Ankaŭ la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo havos en sia programo Movadan Foiron kaj Klerigan Tagon. Post la sukcesa unua provo en Florenco, ankaŭ en Jokohamo la Movada Foiro okazos lige kun la sabata Interkona Vespero. En ĝi landaj kaj fakaj asocioj, eldonejoj, kulturaj kaj movadaj instancoj k.a. povos prezenti siajn agadon, eldonaĵojn ktp. Interesitoj petu specialan respondilon ĉe Anna Löwenstein, Via del Castello 1, IT-0036 Palestrina, Italio; <anna.lowenstein@esperanto.org>.

En la kongresa lundo okazos jam por la kvina fojo la Kleriga Tago. Ĝin organizas Humphrey Tonkin <tonkin@hartford.edu> kaj Michela Lipari <michela.lipari@tiscali.it>, kiuj akceptas ideojn kaj (sin)proponojn por prelegoj, podiaj diskutoj aŭ alispecaj programeroj, kiuj rilatas ekz. al la lingvo, informado, instruado, interreto, kongreslando, ktp.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)



La plej aĝaj esperantistoj de Samara.
Valerij Ŝadrin ĉi-jare festis sian 95-jariĝon.

"IMPETO": RETRORIGARDO EN LA JUBILEA JARO

La eldonejo "Impeto" estis fondita decembre de la jaro 1992. Tio ŝajnas nekredebla, sed "Impeto" estas unu el la plej aĝaj entreprenoj, registritaj laŭ novaj leĝoj ĉe oficialaj instancoj de moderna Rusio. Kiel mi rimarkis, tiu fakto ofte elvokas respektan rilaton al ni flanke de funkciuloj el Ministerio pri eldonaj aferoj de Rusio. Sennombra kvanto da entreprenoj dum la tempospaco el 15 jaroj sukcesis glore fondi sin kaj glore malaperi.

Ne ĉiuj jaroj estis bonŝancaj por "Impeto", cetere same, kiel por multaj loĝantoj de la lando. Estis la jaroj, kiam en ĉiumonata oficiala revuo "Novaj libroj" en la parto de fremdlingvaj eldonaĵoj de monato, Esperanto-libroj de "Impeto" estis solaj. Do, en grandega lando oni aperigis librojn nur en la rusa kaj... en Esperanto.

En la plej granda biblioteko de Rusio – Rusia Ŝtata Biblioteko ("Lenin-biblioteko") – E-libroj de "Impeto" tre baldaŭ superos centtitolan kvanton. Entute al la nuna momento "Impeto" aperigis 177 titolojn, el ili 84 en kaj pri Esperanto. Estas nerefutebla fakto – kiam landa esperantisto venas por paroli al iuj oficialaj instancoj, li preskaŭ ĉiam kunprenas libron de "Impeto" kiel palpeblan pruvon de Esperanto-ekzisto.

Ankoraŭ unu senduba ekzemplo. Mi memoras, kiam en la 80-aj jaroj niaj hungaraj samideanoj sukcesis trabori breĉon en la betona muro de superaj instancoj de tiama Soveta Unio, kaj beletraj E-libroj el Hungario, Ĉeĥoslovakio, Germana Demokratia Respubliko kaj Kubo samtempe aperis en ĉiuj librovendejoj de la tutlanda reto "Druĵba". Post disfalo de USSR, tiu registara interkonsento ĉesis ekzisti, kaj E-libroj malaperis el vendejoj.

Post diverssukcesaj multjaraj provoj la eldonejo «Impeto» en la antaŭa jaro jam "demalsupre" traboris la saman breĉon, kaj beletraj E-libroj denove aperis en kelkaj vendejoj de Peterburgo kaj Moskvo (certe en "Librodomo de Zinger" ĉe avenuo Nevskij en Sankt-Peterburg, en moskvaj "Molodaja Gvardija" ĉe str. Poljanka, "Moskva" ĉe str. Tverskaja, "Biblioglobus" ĉe str. Mjasnickaja). La kvanto de aĉetitaj en librovendejoj beletraĵoj de "Impeto" jam superis ĉiujn niajn kuraĝajn atendojn.

Nun la eldonejo provizas al landaj librovendejoj laŭ konstanta kontrakto sep E-titolojn, kaj ni scias, ke al fino de nia jubilea jaro la kvanto de liverataj titoloj duobliĝos.

De tempo al tempo ĉe esperantistoj aperas la sama demando: "Kio estas la eldonejo "Impeto"?"


Do jen estas konstanta grupo, laboranta dum multaj jaroj: Mikaelo Bronŝtejn (aŭtoro, tradukisto, redaktoro), Mikaelo Ĉertilov (tradukisto, libroperanto), Svetlana Dubrovskaja (librotenisto), Nikolao Gudskov (aŭtoro, redaktoro), Svetlana Smetanina (tradukisto, redaktoro, libroperanto), Vjaĉeslav Te (Tjo) (pentristo), Aleksandr Ŝevĉenko (ĝenerala direktoro), Dmitrij Ŝevĉenko (aŭtoro, tradukisto, interreta administranto), Elena Ŝevĉenko (ĉefredaktoro).

Tiuj personoj estas plenrajtigitaj oficialaj reprezentantoj de la eldonejo "Impeto" por esperantistaj kaj neesperantistaj instancoj.

Aleksandr Ŝevĉenko (Moskvo)

FESTO 2007 – ESPERANTO-MUZIKOS!

"Festo", la renkontiĝo organizita de JEFO (Junulara Esperantista Franca Organizo) kaj EUROKKA (Esperanto-Universala Rok-Organizo, Kolektiva Komunik-Asocio), okazos en la urbeto Montoire-sur-le-Loir (Francio) de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2007.



"Festo", sendube, estas la ĉefa E-muzika festivalo de la somero! Denove Festo-teamo kreas bonegan muzikprogramon. Pri la verdaj steluloj: "Martin & la talpoj", JoMo, "Kore", ili ĉiuj ludos por ni! Pri estontaj steluloj ankaŭ indas vidi: "La Pafklik" (repo en E-o!), "Tifen kaj Ben" (folko), "Melono" (ĵazo), "Nigra flago" (punko)... Sed la evento estos tutcerte "Zhou-Mack kaj La Feve" – profesia regeo-bando, kiu kantas en Esperanto. Kompreneble Festo enhavos ankaŭ multe da programeroj, ekskursoj, prelegoj ktp.

Montoire-sur-le-Loir facile atingeblas, ĝi troviĝas 150 kilometrojn sudokcidente de Parizo. La kotizoj por rusianoj estas 90 eŭroj por la plenpagantoj, 30 eŭroj por la memzorgantoj. Malrabatoj: post la 30-a de aprilo – 20 eŭroj, post la 31-a de julio – 50 eŭroj, pli ol 30 jaroj – 20 eŭroj. Proponu programerojn kaj ricevu rabatojn!

Por ekscii pliajn detalojn kaj aliĝi vizitu la ttt-ejon <http:// festo.esperanto-jeunes.org> aŭ skribu al <cyrille@esperanto-jeunes.org>.

JEFO

KINOESPERANTO FESTIVALO EN ITALIO

Celebre de la centjariĝo de Triesta Esperanto-Asocio, estis lanĉita en septembro 2006 la 1-a internacia konkurso pri kurtfilmoj, je libervola temo, kies oficiala nomo estis: KURTA KINOESPERANTO FESTIVALO. Edvige Ackermann, prezidanto de TEA kaj de la konkursa organiza komitato, kaj Giampaolo Coloni,

arta direktoro, aktive kunlaboris por ĝia realigado.

Trejna pafado de sur milita ŝipo. Distancmezuristo krias:
– Maltrafo – minus 200 metrojn!
Kapitano:
– Stiristo! Antaŭenmovu la ŝipon je 200 metroj!

(per-esperanto-humuro)

Alvenis konkursaĵoj el Italio, Litovio kaj Ukrainio. Tiujn priuĝis ĵurio de 12 personoj el Triesto kaj el Rijeka (Kroatio). La publika prezento de la verkoj okazis la 16-an de februaro, kadre de aranĝoj pri la Semajno de Internacia Amikeco, kaj la proklamo de la gajnintoj – la 23-an.

La aŭtoroj de la unuaj tri klasifikiĝintaj kurtfilmoj ricevos premion – en formo de libroj, medalo, videofilmoj pri Triesto kaj ties regiono, kaj partopren-diplomon.

Jen la nomoj de la gajnintoj kaj la titoloj de la respektivaj filmoj, kun komentoj de la juĝantaro pri la prezentita verko:

– la 1-a premio (105 poentoj) – al Alberto Grossi (Italio) por la filmo "Emocioj" (daŭro 8 min. 28 sek.) – "pro la admirindaj, ravaj bildoj, reliefigitaj de impresema muziko, kaj profesieca uzo de teknikaĵoj. Oni tamen devas aldoni, ke la elparolo ne estis tiom komprenebla, iom tro rapidema kaj mallaŭta, dum prononco ne ĉiam klaris";

– la 2-a premio (93 poentoj) – al instruistino Genovaité Liepinia (Litovio), kiu instigis la geknabojn al kino-kreado, pro la filmo "Kune en lernejon" (daŭro 11 min. 01 sek.) – "pro ties originaleco, imitanta la stilon de malnovaj, silentaj filmoj, pri temo eble iom naiva sed sugestoplena. Ankaŭ la fakto, ke ĝi estis lernejana agado, influis favoran prijuĝon";

– la 3-a premio (85 poentoj) – al Tatjana Auderskaja (Ukrainio) pro la filmo: "Birdoj de Ukrainio" (daŭro 6 min. 40 sek.) – "pro interesa prezentado de la loka naturo. Ankaŭ en ĉi tiu kazo, kaj elparolo kaj prononcmaniero iom ĝenis".

La organizantoj adresas al la gajnintoj tre koran dankon pro la partopreno kaj varman gratulon pro la entute meritoplena laboro.

Oni decidis relanĉi la konkurson, kun espero pri abunda partopreno el diversaj landoj kaj aparte el ekster Eŭropo. Triesta Esperanto-Asocio atendas sinanoncojn de multe pli da filmantoj, kiuj akceptu la defion elprovi siajn kapablojn en la kinoarto. Fantazio, deziro rakonti ion novan, emo al superado de propraj limoj – jen kelkaj ingrediencoj, certe sin kaŝantaj ie en vi mem, utiligeblaj por produkti kurtfilmon, sencoplenan kaj novaĵ-alportan. Informoj pri starto de la 2-a konkurso pri kurtfilmoj esperantlingvaj aperos plej baldaŭ. Jam nun vi povas vin anonci, mesaĝante al <noredv@tele2.it>.

(esper-inform)

EL OMBRO

Ni volas legi interesajn ***rakontojn****.*
Ni volas, ke en Rusio estu pli da ***aŭtoroj*** *–*
jam spertaj kaj ankoraŭ novaj kaj junaj.
Por tio ni bezonas novajn ***librojn****.*
Do, aŭtoro + rakonto = libro!

Kio estas “El ombro”?

Estas libro – kolekto de originalaj rakontoj de rusiaj aŭtoroj en Esperanto. Estas libro, kiu nepre volas trovi sian publikon. Ĝi ekzistas ne por aŭtoroj, sed por legantoj!

Kiu estas invitata partopreni?

Ĉiuj rusiaj verkemuloj! Se vi jam estas aŭtoro – sendu al ni vian novan rakonton! Se vi estas poeto aŭ tradukisto – provu verki prozon, ni certas, ke vi sukcesos! Se vi neniam verkis, sed volas – tio estas via ŝanco anonci vin talenta verkisto!

Kio estu via rakonto, kiun vi sendos?

Temo de via rakonto estas libera. Amplekso de via rakonto estu ne pli ol 12 tajpitaj paĝoj. Se via rakonto estas pli ampleksa – ĉiuokaze sendu ĝin kaj la redaktoroj respondos al vi. Via rakonto devas esti nova (aŭ, minimume, neniam publikigita ie ajn). Se vi havas pli da rakontoj – sendu du aŭ tri! Sendu via(j)n rakonto(j)n antaŭ la 1-a de septembro 2007.

Redakta komisiono

Taksos ĉiun rakonton individue kaj neformale. Lingve korektos kaj stile redaktos la rakontojn. Gravajn ŝanĝojn en rakonto nepre traktos kun ties aŭtoro. Aparte decidos pri loĝantoj de aliaj ŝtatoj, kiuj deziras partopreni.

Kiu prizorgas la libron?

Iniciata grupo kaj Rusia Esperantista Unio, kiu garantias ĉiuflankan reklamadon kaj disvastigadon de la libro tutmonde en Esperanto-libroservoj kaj kongresoj.

Kontaktadresoj de la redaktoroj:

Nikolaj Gudskov <nikolao@yandex.ru>; Grigorij Arosev <arosev@gmail.com>. Sendu vian mesaĝon **samtempe** al la du adresoj! Poŝta adreso por manuskriptoj: 105318, Москва, а/я 57, Н.Л.Гудсков.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

Dum brulas la kandel'

Ne taŭgas la rezulto,
Malvarmas ĝia bel',
Sed korekteblas multo,
Dum brulas la kandel'.



Vivantojn plu stimulas
Progresi l' efektiv',
Se vervigante brulas
Kandel – ilia viv'.

La tempo ne atendas,
Kaj tamen la kandel'
Esperon brule sendas:
"Ne falu el la sel'!"

Eraro, halto, brido
Ne ĵetu al ĉagren'.
Apudas plor' kaj rido,
Vespero kaj maten'.

La lumo treme feblas,
Ne foras la malhel',
Sed multo korekteblas,
Dum brulas la kandel'.

La devizo

(laŭ la romano de V.Kaverin "Du kapitanoj")

Mirinde la roman'
Kun la deviz' inspira
De l' brava kapitan'
Plu vivas koraltira.

Al ĉiu venka prov'
Instigas lin la kredo:
Luktem', serĉad' kaj trov'
Sen manfaliga cedo.

Mutec', milit', perfid'
Venkitoj liaj estas.
Nek trompo, nek insid'
Malforton lian festas.

Plu ŝtormas ocean'
Malica de la vivo.
La homo – kapitan'
Pereas pro la drivo.

Minacas ĝi al am',
Al vojelekto ĝusta,
Penante por ĉiam'
La vivon fari rusta.

Jubilu l' homa pov'
En, malgraŭ ajna sedo,
Luktem', serĉad' kaj trov'
Sen manfaliga cedo!

Viktor Ĉaldajev (Barnaul)

Jena revo...

Ĉe mi 'stas rev'
    veturi ien,
trinkante vinon
    de l' bonspec...
Vetur-veturi
    kuri... kuri..
al lokoj de mia
        junec'.

Vagon'... kupeo,
    kiel iam,
amik'... amikoj...
    trajnkurad'...
kaj senperea vivo
        nia...
kaj la fenestro
    plu sen krad'...

Kaj sen mi restis
    hejmo mia –
prizon' de tristo
        kaj enu',
kaj mia triva nostalgio
la koron enis... –
    sen ke nun...

Aŭtuna mi ja...

En poŝoj mankas mono –
kontraŭas tuta mond',
ke vagu l' vagabondo
al la amika rond'.

Forpasas jar' post jaro...
jen falas foliar'...
kaj blankas la hararo...
somera pasis varm'...

Nur vento vagabondas
sub blu' kaj nuboj nun...
pri l' fora jun' rakontas,
ja mia, nun aŭtun'...

Per trist' la kor' respondas
al flava foliar'...
ĉi mondon mi renkontas
jam post sesdeka jar'...

La vagabondo...

– Kiu estas lasta
al malviva mond'?..
– Estu la unua,
olda vagabond'.
– Estus mi l' unua,
se mi scius ke...
ke en ĝi menue
estas ne la ve'...
– Tiam ni veigos
vin en tiu ĉi viv' –
sanon neniigos
ke ekemu vi...
– Mankas mono pagi
kontraŭ ĉi neni'...
Iros mi plu vagi –
venis jam juni'!..

* * *

Mi ĉiunokte
kuŝiĝas kvazaŭ...
antaŭ duelo...
kun sekva tag'.


SERGEJ LUKJANENKO


La nokta patrolo: Historio unua. Propra destino. Moskvo: «Impeto», 2006. – 184 p. ISBN 5-7161-0163-1. Tradukis *Dmitrij Ŝevĉenko.*


La nokta patrolo: Historio dua. Sia inter la siaj. Moskvo: «Impeto», 2007. – 152 p. ISBN 978-5-7161-0169-2. Tradukis *Mikaelo Ĉertilov kaj Svetlana Smetanina.*

La nokta patrolo: Historio tria. Ekskluzive por la siaj. Moskvo: «Impeto», 2007. – 136 p. ISBN 978-5-7161-0170-8. Tradukis *Gennadij Basov, Mikaelo Ĉertilov, Svetlana Smetanina, Aleksandr Uljanov.*

Pentristo *Vjaĉeslav Te,* Respondeca redaktoro *Elena Ŝevĉenko*







«Mi vidis vin ĉiujn. Kortpurigistojn kaj prezidantojn, banditojn kaj sbirojn. Vidis, kiel patrinoj draŝas filojn kaj patroj perfortas filinojn. Vidis, kiel filoj forpelas patrinojn el hejmoj kaj filinoj kaŝe ŝutas al patroj arsenon. Vidis, kiel ĵus ferminte pordon post gastoj, plu ridetanta edzo batas je vizaĝo gravedan edzinon. Vidis, kiel ĵus ferminte pordon post ebrieta edzo, kuranta al magazeno por drinkaldono, la edzino brakumas kaj arde kisas lian plej proksiman amikon. Tio estas simpla – vidi. Nur necesas scii rigardi. Tial oni nin instruas pli frue, ol instrui rigardi tra la krepusko, – oni nin instruas ne rigardi.

Sed ni tutegale rigardas.

Ili estas feblaj, ili mallonge vivas, ili ĉion timas. Ilin maleblas malestimi kaj krime estas malami. Ilin eblas nur ami, kompati kaj defendi. Tio estas nia laboro kaj devo. Ni estas la Patrolo.»

Aĉetu: www.book.impeto.ru; www.impeto.ru
Moskvo: «Molodaja Gvardija», str. Poljanka
«Moskva», str. Tverskaja
S.-Peterburgo: «Domo de libro de Zinger», avenuo Nevskij

La libroj estas publikigataj kun permeso de la aŭtoro
kaj lia literatura agento en Rusio Aleksandr Korĵenevskij

De la 9-a ĝis la 11-a de februaro en Ĉeboksari okazis Esperantista Regiona Aranĝo (ERA-4) kun la temo "Sinkonsciiĝo". Al la ĉeboksaraj kaj novoĉeboksarskaj esperantistoj venis gastoj el Niĵnij Novgorod kaj Moskvo, entute partoprenis pli ol 30 personoj. La ĉefa enhavo de la programo estis prelegoj, trejnadoj, interkonaj kaj intelektaj ludoj, poezia vespero, noktaj ludoj kaj kantoj.

Tio ĉi estas nur eta parto de la libroj, produktitaj de la eldonejo "Impeto", kiu festos ĉi-jare 15-jariĝon (legu en la p. 38)